

Bulgara Esperantisto

Novembro 1988



ENHAVO

- 3 Kongresaj impresoj (Cvetka Miteva, Belka Beleva, Georgi Litov, Atanas Ilkov)
- 10 Intervjuo el Leningrado (Slavčo Ĥristov)
- 12 Abunda somera aktivado (Liljana Dokova, Ljubomir Trifončovski, Ilija Andreev, Rumjana Georgieva)
- 15 Juna esperantisto (Dončo Ĥitrov)
- 18 Unua Esperanto-grupo en la mondo (El „Heroldo de Esperanto“)
- 19 Gaja gramatiko (Cydra)
- 20 Denove pri la E-propagando (Nikola Nikolov)
- 21 Poezio (Aleksandr Blok, Sheila Leah)
- 23 Por vi, kolektantoj! (Svetla Stratieva)
- 24 Ĉu vi kreskigas esperantistidojn?.. (Nikola Uzunov, Anna Brennan/Renato Corsetti)
- 29 Enlanda movado
- 31 In memoriam
- 32 Deziras korespondi

REDAKTA KOMITATO

Cefredaktoro: Maria JANKOVA
 Atanas ILKOV (redaktoro); Dimităr HAĜIEV, Georgi MIĤAL-KOV, Krăstju KARUCIN; Kunĉo VĀLEV, Libertaria MLADENO-VA, Lidia RAEVA (respondeca sekretario), Mariana ELENOVA, Radoslav PARASKEVOV, Nikola NIKOLOV, doc. Stojĉo STOJĈEV, Venelin MITEV.

Pentristo: Penka PETKOVA

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Nikola NIKOLOV

ADRESO DE LA REDAKCIO: bul. „Ĥristo Botev“ 97, 1303 So-fio, Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio
 Eldonkvanto — 6500 ekz.

Materialoj por la koncerna numero de „BE“ estas akceptataj ĝis la 10-a de la kuranta monato — du monatojn antaŭe. La redakcio aperigas nur bonkvalitajn fotojn.

En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla nur per la poŝto kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj pagita en Bulgario estas 7.32 lv. por aliaj landoj — 7.80 lv.

Estas organizita regula registrado de la revuo sur magneto-fonbendo por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Malnova Zagreb

Foto: Atanas ILKOV



El nia leterkest

Karaj geamikoj,

Mi orde aprobas la novajn numerojn de revuo „Bulgara Esperantisto“. Speciale plaĉas al mi, ke „BE“ fariĝas heroldo de ĉio trovebla kaj aĉetebla: E-eldonaĵoj kaj ceteraj esperantaĵoj, kio, miaopinie, estas ege grava kontribuo al la E-disvastiĝo.

Krome, plaĉas al mi scienc-praktikaj publikaĵoj, kiuj konfirmas la taŭgecon de nia lingvo, vekigas intencojn, laboremojn kaj la konvinkon, ke Esperanto jam estas praktike uzata. Interesaj estas sportoŝanĝoj similaj al tiuj de Georgi Dimov-detaĵaj, novelementaj kaj neripetintaj.

Sciigoj pri UEA-agado ankaŭ necesas kaj tio devas esti laŭ mi grava rubriko, ĉar ni estas parto de la tutmonda esperantistaro kaj la „BE“-legantoj ricevos riĉan informon pri tiu agado. La distra paĝo de „BE“ estas en tute nova „vesto“. Tio estas bonega afero! Eĉ se vi havas eblon lotumade premii (ekzemple per libroj) la solvantojn de la solvendaj materialoj.

Ĥristo TONEV

9700 Ŝumen, str. „Panajot Vo-lov“ 12

Estimataj samideanoj,

Delonge mi jam abonas vian revuon, sed ŝajne ĝi neniam estis tiom interesa kiel la ĉi-jara marta numero. Precipe min ravis la noskiĝo de la ĝemela kvinopo. Al tiu familio dume anonima, mi skribis kelkajn salutvortojn. Mi petas vin: sendi al la 5-opo mian salutkarton ankaŭ bulgaringve.

Angele JUDICKENE

Litova SSR, Vilnius 44 a. d. 871

Estimata Angele Judickene,

Ni plezure sendis al la familio de la ĝemela kvinopo en Srednogorie Viajn salutojn kaj poŝtkarton. Ili bonfartas. Je la nomo de la familio kaj je sia nomo ni sincere dankas Vin. La redakcio plu publikos materialojn, tuŝante interesajn problemojn el la socia, kultura kaj scienca vivo en Bulgario.

„BE“

(Daŭrigo sur paĝo 14)



Jaro 57

N-ro 11

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

GRAVAJ PROBLEMOJ DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

Fina celo de la Esperanto-instruado estas kreo de novaj esperantistoj kaj plialtigo de la lingva nivelo, strebo al perfektigo. En tiu fundamenta agado de BEA ĉefan rolon ludas la kursgvidantoj. Konsiderindgrade de ilia personeco dependas la rezultoj. Bedaŭrinde en multaj lokoj oni subtaksas kreon de kvalifikitaj instruistoj. Gvidas kursojn, ne nur metodike, sed ankaŭ lingve nespertaj homoj. Ne estas malmulte la lokoj, kie gvidas kursojn homoj finintaj nur elementan kurson (ekzemple en tia granda Esperanto-centro kiel Stara Zagora)! El Ruse iuj preminsistas, ke KISA pagu honoraron al kursgvidinto nehavanta instrurajton, ĉar la urba societo rifuzas (tute regule kaj juste!) pagi. Bedaŭrinde iuj influhavaj funkciuloj enmiksiĝas favore al la rompadado de la reguloj kaj la disciplino. S-**no** Penju Stojanov el Ĥaskovo per longaj leteroj volas konvinki KISA-n, ke ne estas regule (!), ke instruoj nur diplomitoj pri instrurajtoj. Laŭ li devas instrui ankaŭ homoj finintaj trian, kaj eĉ duan gradon. En nia movado tie kaj tie troviĝas stranguloj, pro tio la pozicio de P. Stojanov ne mirigas nin. Sed mirigas nin la rilato de la eksprezidanto de la Distrikta Estraro en Ĥaskovo Nikola Pilev, kiu alpetas KISA-n aranĝi al Stojanov la rajton instrui! Kiumaniere? Ĉu donacante al li diplomon?

La Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado (KISA) konstatas, ke la lingva nive-

lo de la plimulto de la bulgaraj esperantistoj estas malalta. Unu el la kaŭzoj estas la malalta kvalifiko de la instruistoj. Alia grava kaŭzo (eble unualoke) estas la nepraktikado de la lingvo. Oni ne utiligas la klubejojn por konstanta kaj amasa uzo de la lingvo. En multaj asociaj konferencoj, konsiliĝoj kaj renkontiĝoj oni parolas nacilingve. Pluraj gvidantoj de la movado ne donas ekzemplon tiurilate.

Ne malofte ni estas objekto de preminfluado fare de organizaj funkciuloj por disponigo de bonaj diplomoj al nebonaj kursanoj. Nura bazo pri pritaksoj devas esti la scioj. Alimaniere ni nur parolos pri lingva nivelo, sed ni ne atingos ĝin. En Pleven ekzemple iuj kursgvidantoj rilatas supraĵe al skribaj ekzamenadoj kaj iuj nekontentigaj ricevas altajn pritaksojn. Tio ne estas utila por la Esperanto-movado.

Nun KISA akceptas linion de pli severa kaj objektiva pritakso de la scioj de la kursanoj. Por ĝenerala plibonigo de la agado pri lingva edukado de la bulgaraj esperantistoj ĝi akceptis jenan dokumenton nomintan.

STRATEGIO DE LA EKSTER- LERNEJA ESPERANTO- INSTRUADO

1. La Komisiono pri Instrua kaj

Scienca Agado (KISA) opinias, ke en nia lando estas gvidataj sufiĉe da kursoj por Esperanto-lernado. Iuj el ili atingas tre bonajn rezultojn. En la lando elstaras konsiderinda nombro da bonaj instruistoj. Kelkdekoj el ili ricevis honortitolojn. Dank' al tiu agado la internacia lingvo Esperanto populariĝis vaste en la popoltavoloj.

2. Tamen la komisiono konstatas plurajn malperfektaĵojn precipe en la kvalifiko de multaj instruistoj kaj en la organizo de la instruaro, konfrontajn fluojn, kontraŭ kiuj ni devas batali persiste kaj kontinue.

3. La societoj malfermas precipe kursojn por komencantoj kaj ne zorgas por la plua adopto de la lingvo far la kursfinintoj. KISA rekomendas pli zorgeman organizon de duagrada kurso, kie estas kondiĉoj — ankaŭ triagrada. Almenaŭ 90% el la finintoj de komenca kurso devas daŭrigi en pli altgradaj kursoj.

4. Iuj veteranoj (ordinare kun malalta klereco) kaj apartaj aktivuloj enmiksiĝas nekompetente en la instru-laboro, postulante, ke la instruisto klarigu en la bulgara lingvo kaj ne instruu gramatikon. La opinio, ke Esperanto povas esti instruata sen gramatiko aŭ nur kun la bazaj morfologiaj kategorioj estas nekompetenta kaj primitiva. Okupoj sen gramatiko — tio estas ne kurso, sed konversacia rondo. Tiu ĉi formo estas tre utila, sed post fino de regula kurso.

En tria grado kaj parte en dua estas instruata sintakso, sen kiu oni ne povas adopti regulan uzon de Esperanto. Alia estas la demando kiel oni devas instrui la gramatikajn elementojn — en plej facile adoptebla por la aŭditorio formo. Sed tio estas jam demando de metodiko kaj sperto de la instruistoj.

Ni konstatas, ke iuj kursgvidantoj instruas la gramatikon teorie, uzante multe da nenecesaj terminoj, laŭ la dedukta metodo, diktante kaj postulante parkerigon de la reguldifinoj. La kursanoj devas mem elformi la regulon el la ekzemploj. Grave estas, ke ili povosciu aplikon de la reguloj en la lingvouzo. Dum la ekzamenoj oni de-

vas nome tion kontroli, sed ne postuli deklamadon de reguloj.

ĈIU INSTRUISTO ESTAS DEVIGATA STRIKTE PLENUMI LA AKCEPTITAN POR LA KONCERNA GRADO PROGRAMON KAJ NE DEFLANKIĜI EKSTER ĜI.

5. La praktiko montras, ke la kursanoj stumblas ne en la gramatiko, sed en la konversacio. Pro tio la kursgvidantoj devas dediĉi sufiĉan tempon por konversacio. La societoj devas organizi konversaciajn rondojn tuj post fino de ĉiu grado.

En la klubejoj, en kunvenoj, konferencoj kaj ĉiuj ajn aranĝoj, ĉie, kie estas du aŭ pli da esperantistoj, oni devas uzi esperanton.

6. Ankoraŭ troviĝas societaj estraroj, kiuj komisiis kursgvidadon al esperantistoj sen instrurajto. **ATESTILOJ KAJ DIPLOMOJ SUBSKRIBITAJ DE TIAJ PERSONOJ ESTOS KONSIDERATAJ NEVALIDAJ.** Kontraŭ la subskribintoj estos aplikataj sankcioj.

Ni devas ĉesigi la praktikon de libera disdonado de atestiloj. Tio malhelpas la suprenigon de la lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj.

7. La societoj devas zorgi pri kreo de instrurajtaj kursgvidantoj. En ĉiu komunumo devas esti almenaŭ du.

8. Ĉiu societo en la fiksita templimo raportu al KISA la rezultojn de la kursa laboro surbaze de kiuj ni induktas la rimedojn por plibonigo de la instru-laboro.

9. Oni utiligu amase la korespondajn kursojn, kiuj prezentas plej oportunan formon por homoj kun nesufiĉa libera tempo. En ili krom la tri lingvaj gradoj estas grupo por tradukemuloj. Tiu formo tre kontribuas por pliperfektigo de la lingvo-rego post la supera kurso (III-a grado).

10. Periode oni organizu regionajn metodikajn konferencojn por interŝanĝo de sperto kaj pliperfektigo de la laboro.

ONI DEVAS KONSCII, KE LA KURSA LABORO, PER KIU KREIĜAS ESPERANTISTOJ PREZENTAS BAZAN LABORON DE LA ESPERANTA SOCIETO.

KISA

Jubilea 73-a UK de Esperanto en Roterdamo

● PARTOPRENIS 2316 ESPERANTISTOJ EL 63 LANDOJ

En la nacikarakterata nederlanda havenurbo Roterdamo, kie troviĝas la motoro de UEA — la Centra Oficejo, de la 23-a ĝis la 30-a de julio ĉi-jare okazis la 73-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu estis nekutima por kelkaj kialoj:

Pasinjare la esperantistaro festis la centjaran jubileon de la Internacia Lingvo en ĝia hejmlando — Pollando, kaj komence de la Dua jarcento de Esperanto la UK okazis en la hejmurbo de la Universala Esperanto-Asocio — Roterdamo. UEA jam okdekjara, sed evidente ĉiam juna — markis la unuan paŝon de la dua jarcento. Ĉefe pro tio 73-a UK estis labora kongreso pri la perspektivoj en la evoluo de la E-movado mondscale. Ne hazarde ankaŭ la kongresa temo estis: „Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo”, diversforme kaj multflanke pritraktata dum unu semajno.

La du ĝeneralaj komitat-kunsidoj unuafoje estis publikaj pro la graveco de la traktataj problemoj, rilatantaj al la tuta esperantistaro. En la Unua Ĝenerala Kunsido estis pridiskutita la agado de la pasinta jubilea jaro. La Dua Ĝenerala Kunsido okazis tuj antaŭ la fermo de la UK, en kiu estis resumitaj la rezultoj de la diskutadoj kaj laborgrupoj pri la kongresa temo.

La 73-an UK-on partoprenis 2316 esperantistoj el 63

landoj de Eŭropo, Usono, Azio, elinter kiuj — ĉirkaŭ 60 bulgaroj.

En la fama koncerthalo „De Doelen” okazis la solena inaŭguro, dum kiu la Prezidanto de UEA Humphrey Tonkin salutparolis kaj emfazis la fruktodonan influon, kiun povus havi tiu-ĉi kongreso por la evoluo de Esperanto estonte. D-ro Ottó Haszpra faris enkondukon pri la kongresa temo kaj apliko de Esperanto en

*Kongresaj
impresoj*

scienco kaj tekniko, kiu iomete seriozigis la kongresanojn. Reprezentantoj de multaj landaj asocioj ankaŭ salutparolis. Nome de BEA salutis la kongresanojn Sava Dälboĝov, prezidanto de BEA. Festparolis ankaŭ d-ro John Wells, juna profesoro en la Londona Universitato, kiu ankoraŭfoje notis la gravan taskon de ĉiuj esperantistoj — konvinki la mondon, ke nur Esperanto povus solvi la lingvan problemon. Li dediĉis grandan atenton al la faritaj jam kelkaj paŝoj por monda paco flanke de la registaroj de ambaŭ plej po-

tencaj ŝtatoj — Sovetunio kaj Usono.

Dum la kongresa semajno okazis la Jubilea Festo, kiun ĉeestis multaj honoraj gastoj — inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof, honoraj membroj kaj veteranoj de UEA, ambasadoroj, eminentaj personoj de la nederlanda publika aktivularo. Salutajn vortojn sendis ankaŭ Roman Malinowski, prezidanto de Pola Parlamento; Ingmund Benson, prezidanto de la Sveda Parlamento; la Prezidanto de la Monda Packonsilio k. a. D-ro Tonkin en sia prelego resumis la gravajn ĝisnunajn atingaĵojn de la E-movado kaj skizis ties ĝeneralajn perspektivojn. Li solene fermis la 100-jaran Jubilean Feston kaj proklamis la komencon de la Dua Jarcento de la internacia lingvo Esperanto.

Simbole al la estonteco de la E-movado, grupo de ĉirkaŭ 60 infanoj-esperantistoj, partoprenantoj en la Infana Kongreseto, salutis la kongreson.

Kiel kutime ankaŭ ĉi-jare okazis Tago de la Paco, kies temo estis: „Paco, Ekologio kaj Socia Justeco”, estigita de Yosimi Umeda. Ĝin partoprenis 120 esperantistoj. Referantoj el multaj landoj kontribuis per prelegoj, kantoj kaj filmoj pri mediprotektado kaj socia justeco.

Alia kongresa programero estis la Tago de la Lernejo.

Dum la trihora maratona mozaiko oni prezentis novaĵojn el la eduka mondo — raportoj el afrikaj landoj, instruteknologiojn skizis Zs.

Barcsay, universitataj fakoj en Budapeŝto kaj Ĉinio k. a.

La nova prezidanto de ILEI Edward Symoens enkondukis nin al la laŭtema diskutado „La ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejon”.

Estis prezentita la nova ILEI-estraro, elektita antaŭ la 73-a UK en la Konferenco en Kerkrade, nome: Edward Symoens, prezidanto (kunordigado; informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun UNESKO, UEA ktp.); Audrey Child-Mee, ĝenerala sekretario (rilatoj kun sekcioj, internaciaj korespondaj kursoj ktp.); Stefan Mc Gill, vicprezidanto (lerneja instruado, internaciaj ekzamenoj k. a.); Bertil Andreasson, kasistino (financa administrado, ILEI-konferencoj); Milcolm Jones, vicsekretario (venonta konferenco, lerneja korespondado, ktp.). Aliaj estraranoj estas: Zhang Danchen (evoluo en Azio, Afriko kaj Latinameriko) kaj Till Dahlenburg (gvido de pedagogia komisiono de ILEI, Internaciaj ekzamenoj k. a.).

Enkadre de la kongreso okazis la Cseh-kursoj, seminario kaj jam tradiciaj internaciaj ekzamenoj.

Aparte interesa estis la kunsido pri la Bjalistoka Centro, kie ĉeestis reprezentantoj de la ŝtata estraro de urbo Bjalistok, kiuj respondis al demandoj, rilantaj la konstruon kaj estontajn funkciojn kaj taskojn de la Monda Esperanto-Centro.



Grupo de la bulgaraj UK-partoprenantoj. Meze — la prezidanto de BEA Sava Dălbokov.

Foto: la aŭtorino

En la kunveno de la junaj reprezentantoj de E-klubo el kelkaj afrikaj landoj estis pritraktataj la problemoj de la afrikaj landaj movadoj kaj la taskoj, starantaj antaŭ ili por evoluigi kaj aktivigi la E-agadon en la kontinento. La kvin partoprenintoj en IEK-Pisanica esprimis sian plenan kontenton kaj dankon al la BEA-estraro, kiu invitis ilin al tiu ĉi kurso. Ilia opinio la plej interesa kaj bona rezulto en Eŭropo por ili estis en Bulgario inter la bulgaraj geesperantistoj.

Pluraj movadaj funkciuloj partoprenis la Movadologian

Simpozion, kie estis prezentitaj ideoj por plibonigo de la estonta UEA-agado kaj pridiskutita la ĝenerala perspektiva plano de UEA koncerne de la Dua Jarcento.

Laŭ la programo en la 41-a Sesio de la Internacia Kongresa Universitato devis prelegi la fama verkisto William Auld, kiu ne alvenis pro malsano. La Sesion malfermis la nuna rektoro prof. Jan Knappert. Anstataŭ Auld prelegis spontane Humphrey Tonkin, kiu alprenis pli vastan temon pri la komenco kaj esenca karaktero de la

originala kaj tradukita E-lite-raturo. D-ro John Wells, la konata fonetikisto kaj lingvisto, gvidis la IKU-partoprenintojn tra la lingva mapo de Okcidenta Azio, emfazante la kulturen kaj historian gravecon de la etnaj lingvoj en tiu-ĉi regiono de la mondo. La prelego de la doktoro pri kemio Árpád Máthé el Budapeŝto plej kongruis kun la kongresatemo — „Defendo de la naturo kontraŭ kemia polucio“.

En la Dua Konferenco de Terminologia Esperanto-Centro d-ro Detlev Blanke resumis la taskojn kaj funkciojn de TEC. Sekvontjare oni antaŭvidas okazigon de TEC-Seminario.

La kunveno de Muzika Esperanto-Ligo (MEL) estis

resta okazado de ties 25-jara ekzisto. La prezidanto de MEL Dimităr Terziev raportis pri la sukcesoj kaj problemoj dum la pasinta periodo. Estas antaŭvidata jubilea aranĝo en Bulgario en 1990, kiam oni festos la dekjarigon de la Internacia Esperanto-Horo.

Juristoj-esperantistoj kunvenis kaj fondis komisionon pri oficiala restarigo de la jurista E-organizo dum 74-a UK en Brajtono.

Dum la kunsidoj de la Virina Komisiono ĉe UEA estis prezentitaj informoj pri la virina agado en kelkaj landoj. Aktuala kaj grava evidentiĝis la problemoj pri la afrikaj virinoj kaj ties partopreno en la E-movado.

Pro aktiva agado kiel vicprezidanto de UMEA estis premiita prof. d-ro Kiril Popov el Bulgario, prezidanto de la Nacia Sekcio de la Medicinistoj-Esperantistoj.

Estis anoncigitaj ankaŭ la premiitojn en la Belartaj konkursoj, organizitaj de UEA. Ĉi-jaran internacian premion por kanto Anokina gajnis Antoaneta Atanasova el Bulgario kune kun Serafim Džatčin por la kantoj „Epitafo“ kaj „La sciuro“.

La 73-a UK en Roterdamo estis efektive rezultoplena kaj fruktodona je ideoj, es-tontaj iniciatoj kaj laboroj por la E-movado, komence de la dua jarcento.

Cvetka MITEVA

Bunta arta programo

73-a UK de Esperanto en Roterdamo ĉi-jare inkluzivis sufiĉe riĉan kulturen programon, kiu plezurigis la diversnaciajn kongresanojn.

Tri grandaj vesperaj programoj plenumis la kongresan halon „L. L. Zamenhof“: nacia, teatra, internacia.

Jam jarojn Bulgara Esperanto-Teatro (BET) estas ŝatata gasto sur la teatra scenejo. El „Kongresa kuriero“ n-ro 5: „Kelkajn vortojn pri BET... ĝian enhavon la esperantista popolo ĝuas jam 30 jarojn. Jen helpe de Ŝekspiro, jen de Arbuzov kaj ankaŭ de P. Panĉev, el kies verkaro la Bulgara Esperanto-Teatro elektis por la nuna kongreso FABELON PRI KALPAKOJ.

Unu el la protagonistoj de tiuj fabeloj diras: „Ĉu por la palacoj reĝaj mi ne ŝanĝus vin“. Tiu formulo plene taŭgas por la kolektivo, kiu daŭre konservas sian tradiciojn: kaj se temas pri la profesieco en aktorado aŭ reĝisorado, kaj koncerne la elekton de surscenigotaj dramoj. Tio povas plaĉi aŭ ne, sed almenaŭ ĉi spektanto scias, ke lin

aŭ ŝin ne surprizos iaj modernaj dubindaĵoj kaj riskemaj eksperimentoj. Eble pro tio la spektakloj de BET ĉiam estas varme akceptataj.

La teatraĵon, tradukitan de Kunĉo Válev, surscenigitan de Gertruda Lukanova, kostumitan de Maja Uzunova, prezentis Luna Davidova, Belka Beleva, Veneta Zjumbjuleva, Nikolaj Uzunov, Teo Jurukov.

Al la kanta arto de bulgaraj artistinoj estis proponita eminenta loko — per programoj en la nacia kaj internacia vesperoj, en aparta propra koncerto. Maria Angelova majstre tuŝis la varmon de nederlandaj popolkantoj. Galja Kostova temperamente plezurigis per operetaj arioj. Karamfilka Adamova prikantis la profundan doloron en la bulgara popolkanto. Ŝi prezentis sukcese sian ekspozicion de naciivestitaj pupoj. La lasta arta programero de UK jam tradicie apartenas al la Internacia Ĥoro kun ties estro Dimităr Terziev.

La respondeca komisiono de Belartaj Konkursoj prijuĝis premion en branĉo

„kanto“ al Antoaneta Atanasova kaj Serafi-
ma Djačin pro iliaj du kantoj.

En la libroservo videblis libroj kun la aŭ-
tora nomo de Georgi Miĥalkov.

La bulgaraj artistoj mem estis publiko de
diversaj artaj aranĝoj: monospektaklo de
pola aktoro Kazimierz Mazur laŭ la rakonto
de A. S. Puŝkin „La neĝa blovado“ en tra-
duko de Antoni Grabowski, lige kun 100-
jariĝo de ĝia apero — aktorado talenta, in-
teligenta, renesanca laŭ atmosfero, sprita
spektaklo; „Dekameron 8,5“ laŭ Bokaĉo
en plenumo de Pupteatro el Bjalistoko.

Prezentis sian artkanton la opera barito-
no Smyčka kaj tenor Vich el Ĉeĥoslovakio,
Galja Staneŝnikova en akompano de Elena
Puĥova el Moskvo, la nederlanda baritono
A. de Ruyter. Ni ĝuis la artecon de pianisto
Geert Dehoux, de harpistino Saskia Veen,
de la ĵaz-orkestro nederlanda. Agrablan
etoson kreis la kvarpersona ensemblo „Kaj-
to“ per sia plenumo de kantoj pri maro,
maristo, ŝipo...

Pentro- kaj fotoartaj ekspozicioj je la
kongresa temo, pri 80-jara jubileo de UEA,
pri esperantistaj lokoj kaj eventoj videblis
sur la kongresejaj muroj.

Per esperantigita teksto prezentis filmojn
Hungario, Pollando, Ĉinio... En la kongres-
ripozlokoj televidiloj montris tuttage fil-
mojn pri la naturo de Nederlando, pri ties
tradicia kaj moderna arkitekturo kaj floroj,
pri plej grandaj majstroj de la pentroarto...

Verkistoj de Esperanto-literaturo donis
subskribojn en siaj libroj. Al la ĉi-jara UK
la klasiklingva filologo s-ro Gerrit Ber-
veling dediĉis sian tradukon el la latina de
„Laŭdo de l'stulteco“ de Erasmo de Roter-
damo.

Kiel vera krono aperis „la libro de la jaro“
pri la jubileo de la jaro — JUBILEO —
jarcento de Esperanto, riĉe ilustrita kroniko
de la centjariĝo de Esperanto.

Belka BELEVA

40-a Kongreso de IFEF

„La reloj ligas la landojn-
Esperanto la popolojn!“ Tiu
estas la devizo de la Interna-
cia Fervojista Esperanto-Fe-
deracio. Ĝia 40-a laŭvica
kongreso ĉi-jare okazis en
u. Perpignan, Francio — eŭ-
ropa lando de la rapidaj traj-
noj „TGV“. La urbo havas
ĉirkaŭ 10-jarcentan histo-
rion. Ĉi tie troviĝas multaj
bone konservitaj kasteloj. La
plej granda estas la Palaco
de la Reĝoj de Majorko. La
kongreson partoprenis ĉir-
kaŭ 450 delegitoj el 19 lan-
doj. El Bulgario gastis 15
delegitoj.

Post agrabla amika inter-
kona vespero okazis la sole-
na malfermo de la kongreso
en granda moderna
konstruaĵo — Domo de la
Kongresoj. Per malgranda,
sed interesa parolo S-ro
J. Giessenr-Prezidanto de

IFEF, malfermis la kongre-
son. Sekvis bonvenigaj pa-
roloj de aŭtoritataj gastoj kaj
poste salutparoloj de la
reprezentantoj de landaj fer-

Kongresaj
impresoj

vojistaj sekcioj. Flanke de
bulgara sekcio la kongreson
salutis Georgi Litov. Dum la
kongreso okazis du komita-
taj kunsidoj kaj du plenkun-
sidoj. Estis elektita nova
vicprezidanto — inĝ. Gulyas

el Hungario. Fariĝis
membroj de IFEF la fervojis-
taj sekcioj de GDR kaj Ĉinio.
Okazis interesaj fakprelegoj
de reprezentantoj el Francio,
Norvegio, Danlando k. a. La
Terminara Komisiono disku-
tis pri la plenaj Esperanto-
nacilingvaj terminaraj vorta-
roj, realigotaj fare de ĉiuj
sekcioj. Por nia sekcio tio
estas granda tasko. Je la no-
mo de BEA G. Litov hono-
rigis per jubilea ora medalo
S-ron J. Giessner. Dum la
kongreso okazis kultura kaj
folkloro vesperoj, kaj tri inte-
resaj ekskursoj.

La 10-an de junio per
konciza raporto la prezidan-
to de IFEF fermis la kongre-
son. Solene estis transdonita
la standardo al hispanaj
gekolegoj-dommastroj de la
venonta kongreso.

Georgi LITOV

TEJO kongresis ĉe la bordoj de Sava



La renkonto kun Kroatio estas vere remarkinda kaj kun ĝia ĉefurbo Zagrebo ni rapide al kutimiĝis kiel longaj konatoj. La gastemo de tiu ĉi urbo estas pentrita sur ĝia emblemo — tri turoj kaj sub ili malfermita pordo. Ni, ĉiuj partoprenintoj en la 44-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) alvenis kaj adiaŭis Zagrebon, kun ĝia loĝantaro kaj jugoslavaj esperantistoj kiel amikoj.

En Kroatio, kien de jarcentoj influis unu la alian katolikismo, ortodoksismo kaj musulmanismo, dum la julia semajno de 1988 oni altiris 769 junulojn el la tuta mondo. Ĉirkaŭ la kongresejo videblas aŭtomobiloj, aŭtobusoj, motorbicikloj, sed kiel ĉiam dum IJK plej interesaj estis la buntaj bicikloj, traveturitaj milojn da kilometroj. Unue ili startis je la 4-a de julio el Franca Katalonio — Michele, Lionel, Jeen-Marc kaj Jorgos kaj salutis la partoprenintojn en IFEF — kongreso en Perpignan. Poste la bicikla vojo pasis tra Barcelono kaj kelkaj eŭropaj landoj al la Zagreba kongreso.

KONGRESTEMO KAJ KONTRIBUAĴOJ

La temo estis sufiĉe aktuala — „Komunikado en la 21-a jarcento”. Ĝi ampleksis diversajn aspektojn de la nuntempa kaj estonta komunikado. La diskutoj kaj opinioj laŭ la kongrestemo en nia nuntempo estis ege utilaj por nia movado, kiam dinamike disvolviĝas la amaskomunikiloj, la satelita kaj la kabla televido. Dum la scienca kolokvo oni aŭskultis seriozajn kaj fruktodonajn prelegojn.

Ne malpli interesaj kaj vizitindaj estis la ceteraj programeroj. Ilustrante la ĝeneralan temon sukcese funkciis la grupoj pri kongresaj televido kaj radio, interhomaj rilatoj, komputiloj, diskutrondo pri kibernetiko. Emuloj vizitis la modernan centron de la Zagreba

Televido kaj la redakcion de gazeto „Vjesnik”. La dommastroj variigis la programon ankaŭ per kursoj pri jugoslava folkloro kaj kroatiserba lingvo, Zagreba Instrumetodo, internacia koruso, okupoj de la skeĉpreparado aŭ helpado al la redaktoroj de kongresa bulteno „Legumin”.

La kongresa televido elsendadis vespere inter la horoj 8-a kaj 9-a. Tiam en la kongresa salono „Sono” kunvenis preskaŭ ĉiuj kongresanoj. Ili malpacience atendis la jam konatan kanton „Saluton, Zagrebo!” — signalo per kiu komenciĝis la ĉiutaga programo. Sekvis gajaj raportajoj. La operatoro strebis kapti la interesan specifikajon de tago, serĉante la televidan heroon inter la kongresanoj.

Koncizan demandon pri la kongresa funkciado mi adre-



Ekridetu! Petola foto el kongresa ekskurso.

sis al la prezidanto de LKK Nikola Rašić:

„Miaopinie — diris li — la nuna kongreso ne diferencas de la antaŭaj. Ni direktis nian atenton al la kongresa temo, kia estis prezentita dum la scienca kolokvo kaj dum la tuta kongreso. Bone helpis nin pri pli bona diskutado la kongresaj televido kaj radio. Mi pensas, ke la plej karaktera por la zagreba kongreso estis la aktiva kaj fruktodona partopreno de ĉiuj kongresanoj, kiuj faris sian kongreson interesa kaj emocia“.

50-JARA JUNULO

La 44-an IJK-on oni dediĉis al la 50-jariĝo de TEJO. Kvankam ke la preciza dato de la jubileo estis la 19-a de aŭgusto, en Zagrebo ni festis la kvindekjariĝon de la tutmonda organizo. Tiukaze TEJO-estraro publikis specialan rezolucion.

Bedaŭrinde, en la Kongresa Komitato de TEJO forestis multaj komitatanoj, elektitaj pasintan jaron en Krakovo. Ilin anstataŭis aliaj samlandanoj. Dum la kongreso ne ĉeestis TEJO-Prezidanto — Jan Koszmaluk. Fakte la forumon estris Ĝenerala Sekretario Dietrich Weidmann. Dum la kunsidoj oni pridiskutis la estrarraporton (1987/88), financajn kaj aliajn problemojn de TEJO. Kiel nova landa sekcio la komitatanoj akceptis Malagasan Junularan E-Organizon. Parto de komitatanoj kun Dietrich Weidmann kaj la Prezidanto de la Junulara Socialisma Organizo de Jugoslavio Branko Greganović vizitis la tombon de Josif Broz Tito en Beogrado kaj metis florojn.

KULTURA PROGRAMO

La nuntempa scienco havas centojn da difinoj pri nocio „kulturo“. Unu el la plej disvastigitaj vidas la kulturon kiel specifikan homan agon. Tiel post la titolo „la kultura programo“ mi skribendas preskaŭ pri ĉio — ekde manĝado, dormado ĝis promenoj, sporto, amuzadoj, renkontoj, diskutoj. (Ho, mi ne forgesu, ke en la libroservo aĉeteblis la jam tre konata libro — „Kulturo de la amo“, eldonita de HEA).

*Kongresaj
impresoj*

Sed per kelkaj vortoj mi rimarkos la artprogramon. Zagrebanoj havas tradicion pri organizo de kulturaj aranĝoj kaj festivaloj, inkluzive de la plej populara — PIF (Pupateatra Internacia Festivalo). Pasintjare sukcese pasis Internacia Festivalo „100 jarojn Esperanta kulturo“.

La artprogramo dum IJK konsistis el diversaj laŭ ĝenro scenaranĝoj. El ili aparte min impresis la spektaklon „Pif, Paf, Puf“ kun elementoj de absurda teatro, skeĉo kaj pantonimo. Nature, la plej riĉa estis la muzikprogramo. La estrada grupo „Quizas“ el Zagrebo fariĝis por kongresanoj ŝatata kaj dum ties koncerto la aplaŭdoj longe

ne eksilentis. La admirantoj de la rokmuziko ne enuis — la grupoj „Persone“ kaj „Amplifiki“ per malmola sono plenigadis la ĉirkaŭaĵon de la kongresejo. Bonajn momentojn ni pasigis ankaŭ per la folkloro grupo „Ivan Mladen“ el apuda urbeto Velika Gorica.

Dum la kongresa ekskurso ni busvojaĝis tra la Kroatio — tero monteta kaj ebena, distranĉita de riveretoj, ludataj torentoj, herbejoj per odoraj kamparaj floroj. Ni vizitis Kumrovec — naskiĝloko de eksprezidanto de Jugoslavio — Tito, apoganto de la Internacia Lingvo. Neforgeŝebla estis nia renkonto kun fama mezepoka kastelo Traĥoŝĉan, situanta en freŝaj abiaroj, apud lageto. Per tiu ekskurso ni vere enamigis al Kroatio...

BULGARA KONGRES-PARTOPRENO

Ĉu oni sentis la bulgaran ĉeestadon en Zagrebo? Jes kaj ne. Antaŭ la kongresejo ĉiutage nia esperanta buso fritiĝis sub la julia suno, kaj tiamaniere ĝi plej ofte memorigis pri nia partopreno.

En la Kongreskomitato laboris Ljubomir Trifonĉovski kaj Dimităr Dimitrov. Kelkaj personoj partoprenis kunsidojn de la Kongreskomitato kiel anstataŭantoj. Eĉ unu bulgaran ni ne povis vidi en la Internacia Koruso de Kostas Zaĥarakis.

La amika trio Rangel Dimĉev. Dimităr Petrov kaj Rusko Abaĝiev ekfunkciigis kasedon kun bulgaraj popularaj dancoj, prezentitaj de la fama muzikisto Ivo Papazov kaj la junuloj triope ekkondukis popolan dancan. Estis

interese vidi, kiel „la frenezo” ekludis en la piedoj de eksterlandanoj, kiuj provis danci niajn popolajn dancojn. Samaj trioje dum la internacia vespero prezentis kantbukedon.

ANSTATAŬ SENTIMENTA ADIAŬO

„Adiaŭa vespero”, „Adiaŭi”, „Ĝis” — konataj

vortoj fine de ĉiu renkonto, kongreso aŭ aranĝo.



Kongresanoj tra la urbo.
Fotoj: la aŭtoro

Kiam ni atingis la finon de la 44-a IJK, ni ne ekmalgajis, ni simple ĝojis, ke ni estas en Zagrebo, inter amikoj. Oni solene transdonis la kongresan flagon al sekvonta LKK en Kerkrade (Nederlando). Ni jam pense veturas al la nova kongreso.

Zagrebo—Sofio

Atanas ILKOV

KUNSIDIS JUNAJ BALKANAJ ESPERANTISTOJ

Dum 44-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO havis sian kunsidon reprezentantoj de E-sekcioj de TEJO el Balkanaj landoj. Ĝin partoprenis nur junaj esperantistoj el Bulgario, Greklando kaj Jugoslavio. Oni pridiskutis estontan kunlaboradon laŭ jenaj punktoj: E-junularaj sekcioj interŝanĝos informojn pri diverspecaj renkontiĝoj, seminarioj,

laborbrigadoj ksm organizataj en la balkanaj landoj; okaze de seminarioj oni invitu kiel instruistojn aŭ prelegantojn spertajn junajn esperantistojn el aliaj balkanaj landoj; interŝanĝi bultenojn

kaj gazetojn de E-junularaj sekcioj; espolori eblecojn por interŝanĝo de E-libroj; kune pripensi eblecojn por helpo de la Esperanto-movado en Rumanio kaj Albanio; okaze de venonta Balkana E-kongreso, kiu estos 1989 en Jugoslavio, organizi kunsidon de E-sekcioj de TEJO el Balkanaj landoj.

EN LA ETOSO DE „PERESTROJKA” — AL NOVAJ AGOJ

Kun Vladimir Gromov, Prezidanto de la Leningrada Filio de ASE, ni renkontiĝadis plurfoje — dum diversaj aranĝoj en Bulgario, dum turneo de ĥoro „Eterna Muziko”, en lia domo en Leningrado. Por mi jam estas tre klare, ke li — la kemiscienca kandidato, la scienca kunlaboranto de la Teknologia Instituto malgraŭ sia okupiteco estas ekskluzive sindona al la Internacia Lingvo. Min ĉiam surprizis liaj energio kaj iniciatemo. Do, ĉu estas mirinda, ke la sukcesoj de la loka Esperanto-organizo pliĝas, ke ĝi disvolviĝas laŭ la postuloj de la nova tempo! Jen kial kun granda deziro mi aliris la novan renkontiĝon. Ĝi okazis en aŭgusto j. k. en la Domo de Amikeco-strato Fontanka — la centro, de kie oni gvidas la Leningradan Esperantistan Organizon.

— Antaŭ nelonge la ĥoro „Eterna Muziko”, jam tre konata al Esperanto-spektantoj, revenis de nova turneo — ĉi foje el Hungario kaj Pollando. Kiel oni akceptis ĝin tie?

— Tiel kiel okazis pasintaŭtune en Bulgario — tre sincere. La ĥorrepertuaro, kiel sciante, entenas popolajn kaj religiajn kantojn malmulte konatajn muzikajn verkojn de la 18-a kaj 19-a jarcentoj — rusajn kaj okcidenteŭropajn. La plenumoj estas en

Esperanto, sed ankaŭ en la rusa kaj ceteraj lingvoj. En Hungarion ni venis laŭinvite de la Junulara Turisma Buroo „Express”. Okfoje ni koncertis en Budapeŝto, Kecskemet, Szeged kaj en aliaj lokoj. Niaj scenejoj estis preĝejoj kaj kulturdomoj. Por la ensemblo tiu estis tre favora etoso — pro la bona akustiko. En Pollando ni gastis en Wroclaw, Sopot, Gdansk, Bydgoszcz. En la ĉefurbo Varsovio la publiko estis partoprenontoj de la estonta UEA-kongreso en Roterdamo. Nia koncertprogramo estis streĉa, sed ĉiuj ensemblanoj estis feliĉaj, ĉar oni komprenis nian arton.

En la Pola Radio pri la ensemblo oni preparis raportojn. En ĝi mi esprimis ankaŭ dankon al la amikoj el Varna, Plovdiv kaj Sofia pri ilia komplezemo kaj kunlaboremo, per kiuj ili renkontis nin dum la turneo en Bulgario.

— Vi menciis, ke dank’ al la iniciato de la Leningrada E-organizo oni finpreparas la eldonon de E-gramofondisko?

— Omaĝe al la 100-jariĝo de Esperanto ĝi jam estas preta kaj al la magazenoj ĝis la jarfino la firmao-produktanto „Melodija” disponigos ĝin. En ĝi estas registritaj plenumoj de „Eterna Muziko” kaj Leningrada Esperanto-Teatro. Mendoj por la disko estas ricevitaj de ĉiuj partoj el Sovetio. Verŝajne samtempe aperos aparta disko de la estrada ensemblo „Tero” el Jalto. Ambaŭ estos la unuaj sovetiaj E-gramofondiskoj. Se oni reklamos en Bulgario ilin, mi estas konvinkita pri la granda intereso al ili.

„Eterna Muziko” preparas duonhoran elsendon por la Leningrada Televido, kun posta videokasedo. Cetere jam aperis informoj pri la ensemblo sur la „malgranda” ekranon.

— Kiu tasko plej multe aktualas antaŭ la estraro de la Leningrada Filio?

Kompreneble, la fondo de nia esperantista kooperativo „Espero”. La ideo ne estas nova — similaj kooperativoj jam funkcias

en Moskvo, Volgogrado, Baku k. a. Sed nur ĉi-jare ni ricevis aprobon de la superaj instancoj. „Espero“-n administros la Domo de la Amikeco, sed la gvidon efektivigos ni, aldonante Esperanto-karakteron de la kooperativa produktado. Kiajn priservojn ĝi faros? Ellaboro de memoraĵoj, tradukoj, tajpmendoj, priturismaj servoj. Speciala estas nia atento al la lingvoinstruo, ellaboro de programoj kaj instrurimadoj por la lerno de fremdaj lingvoj helpe de komputiloj, preparo kaj eldono de instru-metodikaj materialoj. La devizo estas: „Ĉio por Esperanto!“

Por nia organizo la kooperativo grave rolas kiel enspezfonto, tre necesa por pli amasa, kvalita disvolvo de la E-movado. Tamen tiu ĉi utilo ne estas ununura. Per la funkcio de kooperativo „Espero“ ni popularigos la lingvon kaj movadon.

— En la ĉi-jara internacia laborbrigado en bulgara vilaĝo Sădievo, Burgas-regiono unuafoje partoprenis gejunuloj el Sovetio...

— Nia grupo konsistis el 12 homoj. Ties organizanto estas la Komitato de la Junularaj Organizoj en Leningrada regiono. En la klubo por Internacia Amikeco ĉe la Junularpalaco aktivas sekcio „Esperanto“.

kies aktivuloj partoprenis en la bulgara brigado. Ili ĝojas, ke povis konatiĝi kun la ĝemelo de Leningrad-kun Plovdiv, ankaŭ ke ili havis renkontiĝon kun Sofiaj esperantistoj en la Centra E-Kulturdomo.

— Ĉu via organizo partoprenas en la proceso de „perestrojka“ (rekonstruo) en Sovetio kaj kiel?

— Mi atendis tiun demandon. Ĉar estas absurdaĵo, se sovetiaj geesperantistoj, ASE ne ŝanĝos siajn stilon kaj metodojn de aktivado en etoso de la novaj reformoj. Tio rilatas ankaŭ nian organizon. Jen, ekzemple, ni strebos pli aktive kunlabori kun ceteraj sociaj organizoj helpi unu la alian; en la estraro de la Pacdefenda Komitato en Leningrada regiono jam estas du E-reprezentantoj. Tamen ĉio ĉi progresas malpli rapide ol mi volas. La problemoj ligiĝas kun la venko super la kutima inercio kaj kun enradikigo de nova konscio. Cetere, tiu mia opinio estos ĉefa temo de la Tutsovetia Konferenco de ASE, kiu okazos dum novembro-decembro en Moskvo. Ni atendas ĝin kun granda intereso!

Intervjuis: Slavĉo HRISTOV



Kantas koruso „Eterna Muziko“.

Amika renkontiĝo de muzikistoj

De la 20-a ĝis la 30-a de junio en la Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, okazis la Unua Internacia Muzika Seminario. Partoprenis ĥoro el Litovio - urbo Panevežis, ĉambra ĥoro de la instruistinoj el Pazarĝik, ĉambra ĥoro el urbo Gorna Orjakhovica, ĝeĥoranoj de la Internacia Esperanto-Ĥoro.

Dum la Seminario prof. d-ro Stojan Ĝuĝev aŭdigis prelegojn „Muziko kaj Esperanto“, „La genezo de la popolkantoj“ k. a., per kiuj la partoprenantoj pliriĉigis siajn muzikkonojn. Menciindas, ke la litova ĥoro, gvidata de ĥorestrino Monika Vasiliauskienė prezentis sin brile: gajnis niajn korojn kaj la unuan premion kun diplomo. La koncertvesperoj, dum kiuj ĉiu ĥoro demonstris sian artspertecon, interamikigis la diverslandajn ĝeĥoranojn, kiuj interŝanĝis donacojn, insignojn, adresojn.

La gvidanto de la seminario Dimităr Terziev dum mallonga tempo sukcesis prepari kun la ĝeĥoranoj koncertprogramon. La koncerto okazis en salono „Perelik“ — ripozloko Pamporovo antaŭ internacia publiko. Ĉiu ĥoro partoprenis per sia programo kaj je la fino eksonis kvar kantoj de la Internacia Ĥoro. La publiko tondre aplaŭdis la plenumon de la ĥoro.

Dum la seminario, la 24-an de junio okazis Jubilea Kunveno de la

25-jara Muzika Esperanto-Ligo (MEL). Ĉeestis MEL-anoj el Bulgario kaj eksterlando. Parolis la honora prezidanto de MEL prof. d-ro Stojan Ĝuĝev kaj la nuna prezidanto Dimităr Terziev. En la muzika programo partoprenis kantistinoj el Sofio, Stara Zagora kaj Litovio.

La etoso dum la seminario estis amika, Amikiĝis la junuloj, kiuj apartgrupete lernis kantojn kaj prezentis sin dum la adiaŭa vespero. Amikiĝis litovanoj kun bulgaroj kaj aŭstroj. Kortuŝa estis la nacia festo de la litovanoj, kiu fariĝis komuna festo. Ĉiuj kantis, ludis konatigante kun variaj naciaj kutimoj. Ĉiuj parolis Esperante. Eĉ ĝeĥoranoj, kiuj ne uzas Esperanton, regule komencis paroli kun eksterlandanoj kaj perfektigis siajn lingvokonojn.

Ĉiuj longe rememoras la ekskursojn al la pitoreskaj Smoljan, Široka Laka, Pamporovo kaj Plovdiv. Al la eksterlandanoj tre ekplaĉis la ĉarma Rodopa montaro.

Liljana DOKOVA

Esperanto en la Dua Jarcento

Tio ja estis la ĉeftemo de la Internacia Konferenco, okazigita fare de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj Kooperativo de Literatura Foiro inter la 13-a kaj 15-a de julio 1988 en la hungara urbo Szeged. Kvanke TEJO estis aŭspicianto de la aranĝo, la interesiĝo de la Junulara Sekcio de UEA kaj de la partoprenantoj en Internacia Junulara Renkontiĝo, samtempe kaj-loce okazinta, estis malgranda.

La arangita prelegserio estis tre interesa kaj diversproblema: „Esperanto inter societoj kaj komunumoj“ kaj „Proponoj por eliroj“ de Giorgio Silfer (Italio), „La E-Movado kaj E-Komunumo kaj iliaj misfunkcioj kaj eliro el la sakstrato“ de Géza Felasó (Hungario), „Esperanto — varo aŭ valoro? Kia strategio? Kiaj taktikoj?“ de Marco Picasso (Italio), „Motivoj de esperantistigo“ de Oszkár Princz (Hungario), „Esperanto fronte al la instituciaj strukturoj de makrosocio: kia publikilata strategio por la Dua Jarcento“ de Sándor Révész (Hungario), „Esperanto en la Dua Jarcento“ de Tibor Sekelj (Jugoslavio), „Ĉu la Esperanto-Movado povas ignori la naturprotektadon?“ de Rezső Baross (Hungario), „La agado de LBV dum la Dua Jarcento de Esperanto“ de Mário Luiz Bosso (Brazilo). La hungara kolego László

Radácsy kaj mi kunprezentis prelegon pri E-teatraj problemoj, provokintaj viglajn diskutojn. Tie menciindas la nomoj de Perla Ari Martinnelli (Italio), Roland Leveaud (Francio), Jerzy Leyk (Pollando), Árpád Ratkai kaj Balasz Wacha (Hungario), farintaj gravajn kompletigajn rimarkojn pri la pridiskutitaj problemoj.

La Konferenco finlaboris du konkludajn diskutmaterialojn: „Esperanto fronte al la instituciaj strukturoj de makrosocio: kia publikilata strategio por la Dua Jarcento?“ kaj „Esperanto-inter societoj kaj komunumoj: kia organiza strategio por la Dua Jarcento“, vekintaj grandan atenton kaj interesiĝon dum 44-a Kongreso de Tejo en Zagreb, kie ili unuafoje estis eksponitaj.

Ljubomir TRIFONČOVSKI

En agrabla etoso

La tradicia Potsdama Somera Esperantista Tendaro (POSET) ankaŭ ĉi-jare havis lokon en la belega historia ĝardenurbo Potsdamo, Germana Demokratia Respubliko (la 6—13 de aŭgusto).

Kvankam prezentita tendare, la Renkontiĝo nomeblas Semajno de Internacia Amikeco, ĉar efektive flegis amikajn interrilatojn de diverslandaj gesperantistoj kaj per ili — de la popoloj mem.

La aranĝo kaj plenumo de la programo vere estis altnivelaj. La 90 partoprenantoj el 5 landoj (Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando) okupis sian lokon en studenta hejmo de Pedagogia Supera Lernejo „Karl Liebknecht“, kie ili havis bonajn kondiĉojn por kontentigo de viv- kaj amuzbezonoj. La programo inkluzivis duontagajn ekskursojn por trarigardo de rimarkindaj en Potsdamo, Berlino, Brandeburgo ĉe lerta ĉiĉeronado de S-ro Detlev Hofmann kaj aliaj aktivoj. S-ro Hofmann mem estas instruisto pri matematiko kaj akiris E-instruiraĵon en Internacia E-Kursejo, Pisanica. Aparte emfazendas la ekskursoj tra famekonata parko „Sanssouci“ kaj la vizito al Memorejo Cecilienhof, kie en 1945 okazis la historia Konferenco kaj estis subskribita traktato post la venko de la kontraŭnazisma koalicio. Tie ĉio estas historio, ĉio spiras en etoso de la lasta mondmilito kaj rememorigas al la homaro gardi la pacon kaj flegi amikecon inter la popoloj.

La Renkontiĝo oficiale malfermiĝis ĉe komuna vespermanĝo en restoracio „Atlaso“, kie ĉeestis la sekretario de Kulturligo S-ro Siegfried

Schubert. Li gratulis la partoprenantojn, esprimante bondeziron por agrabla restado kaj fruktodona pasigo en plurnacia, sed unulingva medio dank'al internacia lingvo Esperanto.

Post ekskursoj kaj vagadoj tra la urbo kaj ties multaj parkoj, en vesperaj horoj okazadis amuzoj kaj dia-pozitivaj prelegoj, agrable kompletigintaj la programon, liverinte amikan etoson al ties enhavo. Aparte menciindas la prelegoj pri Potsdamo kaj Pekina Universala Kongreso. La prelegon pri Pekino faris la pola samideano Józef Lenart, partopreninta tiun grandiozan manifestiĝon. Ne mankis ankaŭ ŝercoj, anekdotoj, proverboj, enigmoj, multaj amikaj interbabiladoj, opini- kaj spertintersanĝoj divers-agadkampe kaj perspektive, kio detale ne priskribebblas.

Parolante pri la programo kaj efektivigo de tiu aranĝo, valoras menci i almenaŭ kelkajn neforgeblajn nomojn por tiel danki la koncernajn kompleksajn gastigantojn. Ĉiam senlace elstaradis la ĉeforganizantino S-ino Brigitte Raabe kaj ties kunlaborantoj S-ino Eva Seemann — ekskursgvidantino, S-ro Helmut Juling — intendanto, la bufedisto Hans-Jürgen Severin. Ni elkore dankas al ili kaj ceteraj helpintoj kaj kontribuintoj al sukcesigo de la Tendarsemajno.

Ilija ANDREEV

VI Internacia Somera Esperanto-Universitato

De la 16-a ĝis la 21-a de julio ĉi-jare en la pitoreska urbo Veliko Tŕnovo okazis VI Sesio de ISEU. Partoprenis 99 esperantistoj el Bulgario, Sovetunio kaj Japanio.

La solena malfermo okazis kiel kutime en la aŭlo de Universitato „Kiril i Metodij“.

La partoprenintoj aŭskultis la variajn kaj altnivelajn prelegojn. Prelegis Violin Oljanov je temo: „Fundamento de Esperanto — solida bazo por la evoluo de la lingvo“ kaj „La Zamenhofa gramatiko — ĉu el nur 16 reguloj? La preleginto prezentis interesajn faktojn, ke en la ekzercaro de la „Fundamento“ Zamenhof donis praktike plurajn regulojn kaj formojn.

Interesajn faktojn pri la pacmovado de la japanaj virinoj prezentis nia gasto el Japanio Monam Eun.

Nikolaj Gudskov el Moskvo en sia prelego substrekis la paralelajn ideojn de Zamenhof kaj Vernadskij.

D-rino Mirena Denizova el Loveĉ donis multajn ekzemplojn el sia riĉa praktiko pri kuracado de psikaj malsanoj, aparte de alkoholismo kaj narkotismo.

Aleksandro Sljafer el Toms

(USSR) prelegis pri la „Planlingvoj kiel objektoj de semiotika analizo“.

Variuj estis la tri prelegoj de Dmitrij Cibulevskij el Harkov (USSR): „Evoluo de Esperantomovado en Sovetunio dum la lasta jardeko“, „Rusaj kaj sovetiaj poetoj kaj ilia kontribuo al la tutmonda kulturo“ kaj „Biciklado kiel speco de turismo“. La lastan prelegon li ilustris per diapozitivaj pri Siberio kaj la vulkanika duoninsulo Kamĉatka.

Intereson vekis la prelegoj de bulgara E-verkisto kaj kritikisto Georgi Miĥalkov pri la evoluo de la originala Esperanto-literaturo inter 1887 kaj 1944, en kiuj li analizis la verkaron de plej talentaj verkistoj kiel Antoni Grabowski, Edmond Privat, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Eŭgeno Miĥalskij k. a.

Interesajn faktojn pri moderna

instruado de Esperanto la ĉeestantojn eksciis el la prelego „Esperanto en la epoko de la komputilo” de Bojan Lalov.

Fine la prezidanto de la komisiono pri kulturo ĉe BEA Kunčo Válev faris ĝeneraligan paroladon pri la organiza kaj lingva niveloj de VI Sesio de ISEU.

Li enmanigis jubileajn medalojn al veteranoj kaj aktivuloj de E-societo „Lumo” en Veliko Tŕrnovo kaj diplomojn al ĉiuj partoprenantoj en ISEU.

VI Sesio de ISEU bonsukcese atingis siajn celojn, prezentante variajn sciojn el diversaj sferoj de la

scienco kaj kulturo, ebligante al la partoprenantoj pasigi kvin interesajn tagojn en la romantika malnova ĉefurbo de Bulgario.

Al la organizantoj de ISEU en Veliko Tŕrnovo — novajn sukcesojn en la estonta laboro.

Rumjana GEORGIEVA



La partoprenantoj en VI ISEU.



El nia leterkesto



Estimataj,

Mi sendas al vi ĉi tiun rememoron pri mia E-vivo. Se vi pritaksos, ke ĝi ekscitos intereson, bonvolu aperiĝi ĝin en „BE”.

Ana PRAHOVA-PEHLIVANOVA
Plovdiv, str. „Koĉo Cvetaŕov”

88

REMEMORO EL MIA JUNEKO

Kun la miraklo, nomita „lingvo Esperanto”, mi konatiĝis aŭtune de 1923 kaj tuj mi decidis nepre ellerni tiun admirindan komprenilon. Prin-

tempe de la sekva 1924, ĵus fininta la deklecionan E-kurson kiel ununura kursanino de S-no Malĉev, el la tiama Esperanto-gazeto „Esperanto Triumfonta” mi elektis dek adresojn de diverslandaj geesperantistoj al kiuj mi tuj skribis kaj ekatendis respondojn, kiuj ne malfruis. Kiel gajaj hirundetoj ili komencis alflugadi al mi, alportante neeldireblan ĝojon en mian vivon.

Inter unuaj miaj korespondantoj estis uĝu 21-jara studento el Taŝkento. Kiel fojfoje okazas, nia longdaŭra korespondo ĉesis.

En 1966 mi partoprenis la UK-on en Budapeŝto. Foje, dum la kongreso, al mi venis Hristo Gorov, kiu sciigis min, ke iu kongresano el Sovetio interesiĝas pri mi. Kontaktojn

kun tiu lando delonge mi ne havis, tamen kune kun Gorov ni iris al li. Kaj kia agrabla, kia neatendita surprizo! La simpatia, inteligenta, jam 62-jara viro, kiu staris antaŭ ni, estis mia iama korespondanto el Taŝkento, la 21-jara studento Kesar Koblov. Post la fino de sia studado, li estiĝis estro de la fako pri rusa lingvo en la universitato en sia urbo. Li jam estis emerito. Nia renkontiĝo okazis 42 jarojn post la tempo de nia korespondado. Tiuj jaroj ne estis forviŝintaj en li la rememoron pri lia iama 19-jara bulgara literamikino.

Ni ambaŭ estis profunde kortuŝitaj. Ho, ĉi tiuj belegaj minutoj ne priskribebblas eĉ de la plej talenta plumo!...

KUŜ JUNULARA VERVO

● RAPORTAĴO DE LA INTERNACIAJ JUNULARAJ BRIGADOJ ● REZULTOJ KAJ KONKLUDOJ

Iun varmegan aŭgustan tagmezon mi elbusiĝis ĉe vojkruciĝo kaj direktiĝis al vilaĝo Sădievo, regiono de Ajtos, kie laboris la Internacia Junulara Esperanta Brigado „D-ro L. L. Zamenhof”. Survoje apud mi neaten-dite haltis motorciklisto, kiu afable proponis veturigi min al la brigadana kampadejo. Evidentiĝis, ke tiu nigracara kun sunbrunigita simpatia vizaĝo juna homo estis la vilaĝestro Georgi Marinov. Ĉetaso da aroma kafo en lia oficejo mi eksciis, ke la Agrar-Industria Komplexo de urbo Ajtos kaj la Komunuma Konsilantaro en vilaĝo Sădievo kune kun la Esperantista Domo pri Kulturo en urbo Burgas kaj E-societo „Aĝlo” en Ajtos jam trian fojon okazigas en la vilaĝo Internacian Junularan E-Laborbrigadon.

Diversnaciaj brigadanoj loĝas en ĉi-oka-ze konstruitaj dometoj kun ĉiuj komfortaĵoj — lavejoj, banejoj kun varma mineralakvo; la manĝaĵoj estas bongustaj, preparitaj laŭ tipe bulgara kuirarto. La brigadanoj laboras kampare de frumatene ĝis la unua horo posttagmeze. Ili rikoltas cepon, ajlon, persikojn, pomojn.

La brigadestrino Elena Stojkova, sekretario de la Esperantista Domo pri Kulturo en Burgas, havas sufiĉe bonajn spertojn — ŝi trian fojon ja estas unu el la ĉefajorganiza-toj de la brigado kaj ĝin lerte estras. Ŝiaj kunhelpantoj estas Nejko Kunev, sekretario de la Esperantista Domo pri Kulturo en urbo Stara Zagora kaj Minka Stojanova, instruistino en bazlernejo en Ajtos. Entuziasme ili rakontas pri la ĉi-jara laborbrigado, kiun partoprenis ĉirkaŭ cent ĝejunuloj el Sovetunio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Jugoslavio, Korea Popol-Demokratia Respubliko kaj Bulgario. La posedo de Esperanto estis altnivela. Bedaŭrinde tion mi ne povus diri pri bulgaraj ĝejunuloj!.. La kulturamuzo programo estis riĉenhava kaj varia: vesperoj de la nacioj, bivakfajroj, dancado, kantado, celebro de naskiĝtagoj, kvizoj, sportaj konkuroj,

ekskursoj al Burgas kaj insulo Bolŝevik, nokta banado en Nigra maro, projekciado de filmoj kaj diapozitivaj ktp. Mi bonŝancis ĉeesti la nacian vesperon de Sovetunio — bonege kaj sprite realigita: artplenumoj, kantoj, teatraĵetoj-sketĉoj, kvizo pri USSR, donacoj kaj fine — regalo per rusaj teo kaj dolĉaĵoj!.. En la sporta festo inter la ok internaciaj junularaj brigadoj en distrikto de Burgas la brigadanoj el Sădievo gajnis du unuajn kaj unu trian premiojn kaj estis distingitaj per speciala honordiplomo. En la brigado mem ĉiu vespere estis distingitaj per donacoj la plej sukcese laborintaj. Kaj poste la ĝejunuloj dancis en la diskoteko aŭ amike babilis ĉetabele en la vilaĝa kafejo „Esperanto”.

Dum unu el la laborpaŭzoj, ŝirmitaj per ombroj de pomujoj en la vastega pomuĝardeno mi interparolis amike kun Vladimir Dovidij, instruisto en la Supera Konstruins-tituto en urbo Kujbiŝev, USSR, kiu diris:

— Pri la brigado ni eksciis dank'al revuo „Bulgara Esperantisto” kaj pri nia decido partopreni ĝin multe kontribuis per siaj rakontoj ankaŭ la bulgaroj, kiuj laboras en la regiono de nia urbo Kujbiŝev. Tre bone organizita tendaro, tre pura kun bonega prizervado de bongustaj kuirajoj. Plej grava por ni estas la ebleco starigi senperajn kontaktojn kun ĝejunuloj-esperantistoj el aliaj landoj, amikiĝi kaj perfektigi la lingvokojn sur la laborkampoj, amuzade, interparolade... La organizantoj montras veran gastamon. La brigadestrino Elena Stojkova kaj ŝiaj gekolegoj Nejko kaj Minka estas ĉiam je nia dispozo, pretas plenumi niajn dezirojn kaj proponojn. Dum nia komuna laboro kaj dum nia libertempo mi filmis malgrandan filmon, kiun mi plezure montris al niaj geklubanoj en Kujbiŝev. Ĉe ni funkcias esperantista kino-fotostudio „Rondo” kaj mi estas certa, ke la geklubanoj ankaŭ deziros partopreni la brigadon



Foto: la aŭtoro

venontjare. Ni forportas de ĉi tie parteton de Bulgario kaj ni lasas parteton de niaj koroj... Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj zorgis pri ni kaj faris nian restadon agrabla kaj utila!..

Al tiuj vortoj de Volodja aliĝis ankaŭ miaj novaj konatoj Teodoro Ibanes Martin el Bilbao, Hispanio, lia juna samlandano Ferriol Masip, la hungaro Ferenc Podobni el Békécsaba, Vitalij Titov el Leningrado kaj multaj aliaj, kun kiuj mi interparolis. Tio estas la plej sincera dankesprimo al la organizantoj kaj al la bulgaraj esperantistoj.

La internacia E-laborbrigado „Cvetan Spasov“ en Pleven estas jam jubileulo —

ĝi festis sian kvinjariĝon kaj ĉi-jare por sesa fojo ĝi unuigis sub la esperantista standardo 115 gejunulojn geesperantistojn el Nikaragvo, Ekvadoro, Pollando, USSR (Dagjestano), Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario. Brigadorganizantoj estis la Distrikta Komitato de la Komsomolo, la Esperantista Domo pri Kulturo, la Uzino por Konstruelementoj, la Konstru-Muntad-kombinumo kaj la entrepreno „Tehnoprogres“. La brigadanoj loĝis en komunloĝejoj, kiu disponigis al ili komfortajn vivkondiĉojn — eĉ naĝbasenon kun speciala zorganto pri la naĝantoj.

La brigadanoj laboris dividite en tri grupojn sur konstruobjektoj.

Vesperoj de nacioj kun tiucela preparita programo, celebrado de naskiĝtagoj (la „kulpulojn“ oni ĵetis en la basenon), sportaj ludoj kaj konkuroj, renkontiĝoj kun gejunuloj-esperantistoj el societo „Eterna Amikeco“, vizitoj al historiaj turistobjektoj (Panoramo „Epoceo de Pleven“, parkoj „Skobelev“ kaj „Lavrov“, k. a.), diskotekoj kaj instruado pri bulgaraj popoldancoj — tiuj estas nur eroj de la bunta kultur-amuza programo, kiun ĝuis la brigadanoj dum la libertempo en amika internacia etoso. Tiuj ja estas la pozitivaj rezultoj ankaŭ en tiu brigado, pri kiuj dividis siajn impresojn Ernő Könczöl el urbo Eger, Hungario, instruisto pri rusa lingvo kaj Esperanto:

— La intereso al la brigado estis granda kaj la nombro de la eksterlandaj brigadanoj tion ja pruvas. Ili estas junaj kaj entuzmiĝitaj, rapide amikiĝis kaj bone interkompreniĝis, sed bedaŭrinde kelkiom (eĉ ofte!) ne pere de Esperanto, sed... per gestoj. La nivelo de posedo de Esperanto estas malalta, iuj gejunuloj eĉ ne parolas Esperanton... Pro tio la organizantoj devas esti pli rigoraj, akceptante kandidatojn por la brigadoj! Nia hungara grupeto estas tre kontenta de la rilatoj kaj de la labor — kaj vivkondiĉoj en la brigado. Ni jam planas reciprokan gastadon kun plevenaj geesperantistoj. Estas rekomendinde (laŭeble), ke la brigadanoj laboru sur unu mem objekto — tiel ne perdiĝus la kontakto inter la apartaj grupoj. La naciaj programoj ĉiam estis interesaj, sed ofte prezentitaj nacilingve (!), kio embarasigis kaj konfuzigis la spektantaron... Ni estas dankaj pro la korvarma amika kaj gasta-

ma rilato kaj al la brigadestro Ĥristo Filipov kaj ilia helpanto inĝ. Ivan Petrov.

Ni ne faros apartajn konkludojn — pri ili sufiĉe elokvente esprimis siajn impresojn

miaj kunparolantoj. Ni nur devas ilin konsideri estontel!

Sădievo—Pleven—Sofio

Donĉo ĤITROV

RENKONTIĜO KUN DAGESTANAJ BRIGADANOJ

De kelkaj monatoj ni — grupo da esperantistoj el E-societo „Espero” en Loveĉ, senpacience atendis la ĉi-jaran Internacian esperantistan laborbrigadon, organizatan tradicie en Pleven. Ni volis interkonatiĝi kun la esperantistoj-brigadanoj el Sovetunio, pli ĝuste el Dagestano. Pri ilia pasintjara partopreno ni jam sciis kaj per la helpo de la laborbrigada estraro la 13-an de aŭgusto 1988 ni sukcesis persone konatiĝi kun la sovetaj junuloj.

Tutan tagon ni estis kune: promenadis, trarigardis la urbon kaj ĝiajn vidindaĵojn, ĉirkaŭaĵojn kun belaj parkoj, paroladis, multfoje fotis nin reciproke, manĝis.

Kia gaja, agrabla kaj neforgesebla tago

estis! Niaj gastoj informis nin, ke en Dagestano 8 milionoj da loĝantoj parolas 37 lingvojn. Sed ni interkompreniĝis per ununura — per la internacia lingvo de amikeco kaj paco.

Vespere ĉe la adiaŭo niaj novaj Esperanto-sovetiaj amikoj diris: „Ni kore dankas pro la ege afabla kaj amika gastigado, pro la donacoj, agrablaj promenadoj kaj travivaĵoj en via bela kaj originala urbo. Dank’ al vi, ni jam sentas ĝin animproksima kaj elkore invitas vin viziti ankaŭ nian urbon Maĥaĉkala, troviĝanta sur la bordo de Kaspia Maro. Ne forgesu ke ni atendas vin...”

D-rino Mirena DENIZOVA
Foto: Kiril KALĈEV



Unua Esperanto-grupo en la mondo

Same kiel kelkiu grava ideo eliris el Nürnberg, respektive ricevis ĉi tie sian decidan forton, tiel ankaŭ Esperanto enradikiĝis plej frue el ĉiuj germanaj urboj en la nordbavara komerca metropolo, kiu do povas pretendi honoran lokon en la mondlingva movado.



Jam Volapük, la konata eltrovaĵo de la badena pastro Martin Schleyer, estis trovinta komence de la okdekaj jaroj afablan akcepton en Nürnberg, speciale en la tieaj komercaj rondoj, kiuj montris vigan intereson por tiu finkonstruita sistemo de mondlingvo.

En 1885 sufiĉe granda aro da mondlingvanoj fondis la Nürnbergan Mondlingvan Unuiĝon, kiu sub la sindonema gvidado de Leopold Einstein baldaŭ estiĝis la centro de la Volapük-a movado.

Einstein, unu el la malmultaj Volapükistoj, kiu ankaŭ parole sufiĉe regis la komplikan lingvon, estis pasia aktivulo por la mondlingva ideo. Sed li ankaŭ estis tiel kuraĝa, por eldiri jenon: Se iam aperos io pli bona ol Volapük, mi proklamos ĝin kiel la unua, ĉar la pli bona ĉiam estas la malamiko de la bona, kaj la plej bona la malamiko de la pli-bona.

Tiun eldiron li faris en 1886. Kaj neatendita baldaŭ okazis tio: jam en la sekvanta jaro ekstaris danĝera konkuraĵo al Volapük: la internacia lingvo Esperanto. Ricevinte la unuan broŝuron, Einstein tuj plejgrade interesiĝis, kaj ju pli deta-

le li okupiĝis pri ĝi, des pli bone li ekkonis la verajn esencon kaj premisojn de mondlingvo. „La problemoj de internacia lingvo, li skribis kelkajn semajnojn poste al la elpensinto d-ro Zamenhof en Varsovio, estas definitive solvita, kaj ĝojigite mi sendas al vi korajn gratulojn al

kutoj kaj malamikaĵoj de tiu flanko.

Malgraŭ riproĉoj, kalumnioj kaj maldelikataj atakoj Einstein ne ŝanceliĝante daŭrigis sian laboron por Esperanto kaj pruvis la nerefuteblan superecon de la Lingvo Internacia kontraŭ Volapük. La dua broŝuro de Einstein pri la mondlingva evoluo decide influis la lingvomovadon en Germanio — kaj la bonreputacia, influrika Nürnberga Mondlingva Unuiĝo deklaris sin en decembra ĝenerala kunsido 1888, laŭ propono de sia prezidanto Christian Schmidt, oficiale por Esperanto kaj nomis sin de nun „**Esperantista Klubo Nürnberg**“. Vere memorinda fakto! Ĉar tiu klubo estis la **unua Esperanto-organizaĵo** ne nur en Germanio, sed eĉ tutmonde.

La fondiĝo de la unua Esperanto-Grupo en la mondo por Zamenhof estis grava senŝarĝigo, ĉar ekde nun



tiu ĉi solvo. Kion mi longe atendis, tio nun fine estiĝis.

Ok semajnojn poste Einstein eldonis sian unuan broŝuron titolitan „**La lingvo internacia, — la plej bona solvo de la internacia mondlingva problemoj**“, kiu malfermis, unuafoje kaj metodike prilaborite, al la verko de Zamenhof la germanlingvaj landojn.

La broŝuro, kies publikigon L. Einstein pro la ĝisnunaj intimaj rilatoj al M. Schleyer certe ne facilime decidis, kaŭzis grandegan sensacion kaj konfuzon inter la Volapükistoj, al kio sekvis pasiaj perse-

li ne plu sola devis porti la tutan ŝarĝon pri la disvastigo de la lingvo.

Kio ankaŭ ne rajtas droni en forgeso, estas la fakto, ke tiu meritplena Esperanto-pioniro Leopold Einstein iniciatis la aperon de la unua Esperanto — gazeto „**La Esperantisto**“ nur unu jaron poste, la 1-an de septembro 1889 en Nürnberg, modele redaktata komence de Chr. Schmidt kaj poste de Zamenhof mem.

(El „**Heroldo de Esperanto**“, n-ro 11—12/1988)

Gaja gramatiko

Edzino naskis filinon. La patro, kiu generis la filinon, estas direktoro. La ŝatanto de kunmetitaj vortoj, strikte respektante la gramatikajn regulojn, skribos „Direktorfilino“.

La patro estas direktoro de komerca kompanio. La ŝatanto de kunmetitaj vortoj skribos „Kompanidirektorfilino“.

La kompanio organizas vojaĝojn. La ŝatanto de kunmetitaj vortoj skribos „Vojaĝkompanidirektorfilino“.

La vojaĝoj okazas per ŝipo. La ŝatanto de kunmetitaj vortoj skribos „Ŝipvojaĝkompanidirektorfilino“.

La flosa forto de la ŝipoj estas vaporo. La ŝatanto de kunmetitaj vortoj skribos „Vaporŝipvojaĝkompanidirektorfilino“.

La vojaĝoj okazas sur Danubo, la forĝanto de kunmetitaj vortoj nepre skribos „Danubvaporŝipvojaĝkompanidirektorfilino“.

En siaj klopodoj nepre uzi la eblecojn de la gramatiko de Esperanto, la bulgaraj esperantistoj uzas ĝisnaŭze kriplitajn kun-

metitajn vortojn: bulgarlingve anstataŭ en bulgara lingvo; informadikurso anstataŭ kurso de informadiko; nuklearmilŝtatoj anstataŭ ŝtatoj, posedantaj nuklean armilon; malarmadentreprenej anstataŭ entreprenoj pri malarmado; novefortproblemoj anstataŭ problemoj pri novaj fortoj; explorevoluigtasko anstataŭ tasko pri evoluo de esploroj; strategiarmkontrolo anstataŭ strategio de kontrolo pri armado ktp.

Zamenhof ne ribelas kontraŭ modere uzataj kunmetitaj vortoj. Li tamen skribas: „Ni konsilas ĉiam uzadi formojn simplajn anstataŭ kunmetitajn. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana. Ĝi donas al tiu ĉi lingvo grandan riĉecon de formoj, sed en nia lingvo la vortoj estas pli naturaj kaj pli belsonaj, se ili estas uzataj ne kunmetitaj, sed aparte“. (L. L. Zamenhof, „Lingvaj, demandoj“).

Cydra

„PACO“

estas la nura Esperanta gazeto, kiu okupiĝas pri la problemoj de la milito kaj paco, pri la nuklea armado kaj malarmado.

„PACO“ liveras al la legantoj

KROME:

materialojn pri la ekologia vivmedio, la malsato kaj malsanoj en la mondo, diskriminacio, lingvaj kaj komunikadaj embarrasoj, gravaj novaĵoj de la monda E-movado.

„PACO“

krome proponas al la legantoj: lingvajn, esperantologiajn kaj interlingvistikajn temojn de plej elstaraj esperantologoj de la mondo, poeziaĵojn kaj aliajn literaturaĵojn, humoraĵojn, kuriozaĵojn, faktojn el la scienco, la tekniko, la historio, enigmojn, levantajn la lingvan kulturon kaj ĉion, kio povas esti interesa por la legantoj.

La lingvaĵo de „PACO“ estas perfekta. Legante gazeton „PACO“ oni rapide progresas en la lingvo. ABONU kaj ABONIGU al „PACO“! Per tio vi aliĝos al la granda batalo por savo de la mondo de nuklea milito, por malarmado. TUJ ABONU en via poŝtejo! Dum la jaro oni ne akceptos abonon, pro tio ne preterlasu la lastan limtempon por abono en la poŝtejo!

Mi ne samopinias

En la sesa ĉi-jara numero de „Bulgara Esperantisto“ denove aperis la rubriko „Pri Esperanto-propagando“.

Tiu ĉi rubriko estas ege grava kaj necesa. En ĝi aktivaj esperantistoj legas kaj informiĝas pri multaj aferoj, kiujn oni povas sukcese utiligi en sia por- kaj peresperanta agado. Por ke ĝi aperadi regule la redakcio de la revuo ne devas kalkuli nur je hazardaj materialoj, sed ankaŭ mendii tiajn al spertaj kaj kapablaj samideanoj.

En la suprecitita rubriko aperis artikolo „Era-ra praktiko“. La aŭtoro S-no Nikola Aleksiev donas bonajn konsilojn rilate certajn maltrafajn sciigojn pri la iniciatoro de Esperanto. Tion mi plene aprobas kaj estonte, kiam mi parolas pri Zamenhof, mi pli multe parolos pri la poliglota kapablo de nia majstro, kaj mi nur menci- os, ke li estis okulkuracisto.

Sed mi ne samopinias, ke la slogano „Esperanto — dua lingvo por ĉiu homo“ estas malbona, maltrafa kaj anstataŭ propagandi nian aferon, faras la malon. Tiun sloganon oni ĉiam povas legi dum la plej amasaj ĉiujaraj niaj aranĝoj — la Turistaj Esperanto-Tagoj en Sofio. Ĝi jam kvar jarojn flirtas super la tendoj de la Esperanto-grupo, kiu partoprenas la Internaciajn Danubajn Remadojn. Vidas kaj legis ĝin pli ol 10 000 personoj. Mi povas certigi S-anon Aleksiev, ke tiu ĉi slogano ne nur ne damaĝis al Esperanto kaj ties movado, sed male-helpas ilin. Dank' al ĝi kaj aliaj propagandiloj ni ĉiujare sukcese varbas gekursanojn por niaj konversaciaj turistaj Esperantistaj kursoj. Tio repetiĝis ankaŭ ĉi jare. Dum la Turistaj Esperanto-Tagoj ni vendis 60 lernolibrojn kaj 43 festantoj esprimis deziron lerni Esperanton en la anoncitaj de ni kursoj.

Ni bezonas multe da similaj trafaj sloganoj, kiujn ni uzu dum niaj aranĝoj, manifestacioj kaj alispecaj agadoj. Fakte ne la sloganoj kulpas, sed nia pala kaj malbone organizata varba kaj propaganda agado.

Estas interese ekscii la opinion de aliaj esperantistoj pri la diskutata temo. Oni rakontu sur la paĝoj de nia revuo pri sia sperto.

Nikola NIKOLOV

Noto de „BE“. La redakcio aliĝas al la invito de S-ano Nikolov. Ni, estimataj legantoj, atendas viajn opiniojn.

Belgaj esperantistoj ne krokodilas

S-nino Monique Gaestecker, Kerkstraat 66, B— 9940 Sleidinge, Belgio, dufoje vojaĝis al Bulgario. Krom Sofio ŝi vizitis kelkajn aliajn urbojn kaj vilaĝojn. Ŝi ankaŭ feris en la Internacia E-Kursejo. La bulgaraj samideanoj kun kiuj ŝi interparolis konstatis, ke ŝi tre bone kaj flue parolas Esperanton. Ĉar multaj bulgaraj samideanoj ankaŭ strebas bone ekposedi kaj senĝene konversacii Esperante, reprezentanto de la redakcio demandis S-ninon Gaestecker kiamaniere ŝi el-lernis tiel bone Esperanton. Ŝi estis afabla diri la jenon:

— Mi eklernis Esperanton en 1983. Ĉar dum niaj kunvenoj kaj renkontoj oni ĉiam parolas Esperanton, mi tuj havis eblecon paroli la lingvon. Krome mi pristudis kelkajn verkojn pri gramatiko kaj bona stilo de famaj esperantistoj, i. a. de Zamenhof mem. Kompare kun la nombro de la esperantistoj, ekzistas amaso da bonaj kaj interesaj libroj, do mi legas Esperanto-librojn kaj revuojn. Vojaĝante mi ek-konis interesajn homojn kun kiuj mi korespondas. La esperanta vivo kaj kulturo estas parto de mia ĉiutaga vivo.

Kiel mi jam diris, en kunveno, eĉ ordinaraj renkontoj, ni ĉiam parolas Esperanton. Kiam ni hazarde renkontas unu la alian en la urbo, ni neniam krokodilas, eĉ se ni nur havas tempon por saluti. Eĉ duope en teatro aŭ kinejo ni praktikas la lingvon. Vi ne povas imagi la efikon de tio sur la ekstera publiko. Tuj oni demandas al ni pri la lingvo kaj petas informojn. Ni volonte rakontas al ili pri la Internacia Lingvo laŭ kelkfoje devas respondi al kritikaj kaj tiklaj rimarkoj. Mi spertis, ke paroli Esperanton inter si sur strato aŭ en butikoj estas nur bona lernado kaj praktikado de la lingvo, sed ankaŭ estas la plej bona kaj efika propagando por Esperanto.

Kompreneble kun eksterlandano ni ĉiam parolas Esperanton. Belgaj geesperantistoj konscias, ke estas tre malĝentile paroli nacian lingvon kiam eksterlandano ĉeestas. Bedaŭrinde mi konstatis en aliaj landoj, ke kvankam oni faras multe por ke la gasto sentu sin aĝable, oni tamen konstante krokodilas. Tiamaniere oni forpuŝas la gaston el la rondo kaj li sentas sin malagrabla kaj izolite. Ofte multe da esperantistoj ne parolas la lingvon kaj do, ne valoras la penon iri tien.

En Bulgario multe da homoj estas tre entuziasmaj pri la lingvo, sed ne kuraĝas paroli ĝin en samideana medio. Estas mirinda konstato, ĉar ĝuste en Bulgario troviĝas la plej bone strukturita kaj sukcesplena Esperanta movado. BEA devas konkrete multon fari por ke la lingvoscio kaj la praktikado pliboniĝu. Mi forte substrekas la gravecon, ke esperantistoj parolu inter si nur Esperante. Estas nur avantaĝoj: vi praktikas la lingvon kaj kapablas paroli ĝin bone kiam eksterlandanoj venas aŭ kiam vi iras eksterlanden.



ALEKSANDR BLOK

KNABINO KANTIS...

*Knabino kantis en templa ĥoro
Pri ĉiuj lacaj sur fremda ter',
Pri ĉiuj ŝipoj en mara foro,
Pri ĉiuj vagaj sen ĝoj' kaj ver'.*

*La voĉo ŝvebis dolĉa kaj pura
Sur blanka ŝultro brilis radi'.
Rigardis ĉiu el la obskuro
La blankan robon en luma stri'.*

*Kaj ĉiu pensis, ke ĝojo venos,
Havenon ŝipoj atingos tuj,
Ke al laculoj jam apartenas
Serena vivo en for-fremduj'.*

*La voĉ', radio mallumon boris.
Ĉe Car' nur fore, pro vana pen',
Infan', misterojn konanta, ploris
Pro eblo de la nenies reven'.*

Esperantigis el la rusa: Nikolao GUDSKOV
Moskvo

LA VIZITO

Medito post gastado ĉe mi de la fila
familio el Srilanko.

*Ĉe mi vi kiam gastis, mia mondo brilis
kaj ĉiu son' feliĉmuzikon eksimilis.
Plej bonajn vivdonacojn abunde mi havis,
sunbrilo, amo, gaja min kuniĝo ravis.
Pasigis ni horojn profunde kontentaj...*

*Nun ja, ho, miaj karaj, vi foriras,
sed ankoraŭ la ĝojo plu respiras,
ĉar tiom granda bril' neniam estingiĝos.
Per ora lum' malplenaj ĉambroj plu briliĝos,
feliĉaj voĉoj — sentoj sonos tra silento.*

1988

Sheila LEAH
Aŭstralio

NOVA TALENTULO

Sur la foto estas la juna esperantisto Ljubomir Pavlov. Li havas 14 jarojn kaj eklernis Esperanton en 1985. Li estas unu el la plej junaj membroj de E-societo „Espero” en komunumo „Nadejda” de Sofio. Ljubomir korespondas kun gejunuloj el Pollando, Sove-tunio kaj Francio. Liaj gepatroj ankaŭ estas aktivaj esperantistoj. Ili partoprenis la 8-an Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj en Zagurnik, Pollando.

Ljubĉjo lernis ludi bulgaran muzikan popolinstru-menton sakfluton. Dum la ĉi-jaraj 3-aj Turistaj Esperanto-Tagoj en Sofio li kun granda sukceso partoprenis la belartan programon „Esperanto-talentoj sin prezentas”.

Noto de la redakcio: Ni ŝatus publiki sur la paĝoj de la revuo interesajn fotografiojn pri la agado de la societoj, kluboj kaj ties membroj. Ni esperas, ke multaj niaj legantoj aktive kunlaboros, por ke la revuo estu ĉiam enhavo-riĉa.





POR VI, KOLEKTANTOJ!

La 31.05.1988 en 118 Sofia mezlernejo „Ljudmil Stojanov“ estis aŭdigita la aktuala temo: „Koniga, kleriga kaj eduka roloj de Esperanto en kolektado“ — la unua kadre de serio, destinita por E-kolektantoj. Ĝin gis unu el la 8-aj klasoj, kie jam ekde jaro kiel regula lernobjekto estas instruata Esperanto, kies ekposedon stimulas la neceso de praktika uzado. Kolektado de esperantaj helpo de la Internacia Lingvo estas konvena originala agadformo, ege utila por plialtigo de nia lingva nivelo.

La prelego konigis al la gelernantoj skizitan antaŭhistorion, kolektadspecojn kaj rolon de Esperanto por ties realigo. Komence Ivan Aleksiev, multjara E-kolektanto, demonstris parton de sia kolekto de esperantaj, tiel elbliginte al la gejunuloj konstati almenaŭ parteton de la praktika kontribuo de la lingvo al tiu ŝatokupo. La kunpreleganto Nikolaj Ĉervenkov, lektoro ĉe la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelistoj rakontis pri la valoroj de diversaj kolektoj kaj interesaj momentoj, kuriozaj historioj en la vivo de la kolektemuloj. Lia altprofesia kaj samtempe emocia eksponmaniero de informo provokis vivan intereson, pri kiu atestas multaj starigitaj demandoj flanke de la aŭskultantoj.

Jen kion diris la E-instruistino Ekaterina Kambanova: „La interesiĝo al E-korespondado ĉe la gelernantoj estas vere granda. Ili mem serĉas adresojn de tutmondaj samaĝuloj, kun kiuj povus interŝanĝi informon kaj kolektendaĵojn, kio ege helpas al ili variigi, riĉigi siajn kolektojn kaj antaŭ ĉio por E-praktiko kaj-perfektigo. Sendube, pri kolektado pro ties universaleco ne eblas dum du lecionoj ekscii multon. Por ni prezentos intereson al efektivigo de la ceteraj prelegoj, ĉar tiu okupo, kvankam hobia, postulas asimilon de fundamentaj teknikreguloj kaj sistemajn konojn. Espereble, tio ĉi vere notas nur komencon“.

La Sekcio de esperantistoj-filatelistoj, kolektantoj kaj numismatoj eltrovis kaj disponigis al la gelernantoj de la sama klaso adresojn de diverslandaj kolektantoj.

Por plenumo de sia provizora programo pri plialtigo de estetika, teknika kaj profesia spertoj de siaj anoj, paralele kun la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelistoj, la Sekcio planas efektivigon ankaŭ de aliaj similaj prelegoj enlande, depende de la interesiĝo kaj la klerecnivelo de la membroj.

Tiu starto estas siaspeca sukceso en la laboro de la Sekcio kun gejunuloj.

Svetla STRATIEVA

NOVAJ POŝTMARKOJ



Asocio „Komunikado“ en PR Bulgario emisiis la 10-an de junio 1988, specialan serion el 4 poŝtmarkoj kaj unu bloko dediĉitaj al la 8-a Eŭropa Konkuro pri Futbalo en FRG—1988. Aŭtoro de la projekto estas la pentristo Ivan Bogdanov.

La objektoj kaj la valoroj de la poŝtmarkoj estas jenaj: Plenumanto de angula pilkobato — 5 stotinkoj; Avanulo kaj golulo en aera batalo — 13 stotinkoj; Avanulo dum ludo kaj futbala juĝisto — 30 stotinkoj; Konkuro kun la Pokalo de UEFA — 42 stotinkoj; Bloko: marko en bloko-futbala stadiono. En la kampoj — la emblemojn de UEFA kaj de bulgara Futbala Asocio — 1.00 lv.

Formatoj de la poŝtmarkoj — 28.5 × 39 mm (horizontale), de la bloko — 67 × 87 mm.

Papero — blanka, 100% celulozo; tekniko — ofseta preso. Eldonkvantoj: de la serioj — 250 000; de la bloko — 210 000 dentumitaj kaj 12 500 nedentumitaj-numeritaj.

Presejo: La ŝtata presejo de la Komunikado. Draguŝko PETROV

ĈU VI KRESKIGAS ESPERANTISTIDOJN?..

Al „Bulgara Esperantisto“

Gesamideanoj,

Ni estas geesperantista paro, kiu atendas infanon. Ni multe pensadis kion fari por instrui al la naskonta ido la Internacian Lingvon? Post longa cerbumado ni decidis skribi al vi, ĉar en Bulgario oni jam spertis tiun problemon. Verdire, ni ne kuraĝas elekti Esperanton por nia estonta bebo, ĉar ni timas malhelpi ĝian normalan disvolviĝon.

Por ni viaj konsiloj estas ege bezonataj. Atendante viajn skribajn konsilojn, ni tutkore salutas vin.

Argelio kaj Maritza

Nia adreso estas:

Calle 294 № 19922, ENTRE 199 y205
El chico, Wajay Ciudad Habana, Cuba
por Argelio Guadarrama Corrales

Estimataj Argelio kaj Maritza,

Bedaŭrinde inter ni-redakcianoj, mankas homoj, kiuj praktike konas vian problemon. Pro tio ni proponas al via atento la konsilojn de bulgara esperantisto Nikola Uzunov. Ankoraŭ ni donas lokon al artikolo pri sama demando, publikigita en „Esperanto“, n-ro 3/88.

Fine la redakcia kolektivo „donacas“ al via kaj al ĉiuj ĉiam ĉarmaj denaskaj esperantistidoj du dolĉajn versajetojn, verkitajn de fama bulgara poetino Dora Gabe.

„BE“

Rakonto laŭ miaj spertoj

Mi provos rakonti pri miaj spertoj kaj alfrontitaj malfacilaĵoj dum la instruado de Esperanto al miaj du filinoj. Kompreneble ili nun estas jam sufiĉe aĝaj (18- kaj 15-jaraĝaj), sed mi rakontas pri ilia denaska esperantiĝo.

Ĉio komenciĝis jam post mia edziĝo kun virino, kiu estas ankaŭ esperantistino, eĉ mia ekskursanino. Ni kune decidis, ke niaj infanoj ekparolu denaske Esperanton je namaniero: nur mi parolos kun ili Esperante, sed la panjo bulgare, por ke la infanoj ne lernu surstrate la gepatran lingvon.

Tiucele mi havis neniajn spertojn, nek eblecon dividi spertojn kun iu E-familiano, tiutempe netrovebla. Mi havis nur grandan deziron, ke miaj infanoj denaske ekpa-

rolu Esperanton, kiun miaopinie mi posedis sufiĉe bone.

Jam la duan aŭ trian monaton post la naskiĝo de mia unua filino Marina mi obstine komencis paroli al ŝi nur Esperante. Miaj parencoj, amikoj, konatoj fojfoje primokis min pro tio, ke mi parolas al dumonata bebo Esperante. „Ĉu ŝi komprenos ion de via lingvo?“ — ofte ili demandis min. „Atendu dum ŝi fariĝos du — aŭ tri-jara!“ — ili konsilis min. Sed mia forta konvinko estis, ke la infano jam de sia plej frua aĝo devas kutimiĝi al la lingvo. Poste mi legis en koncerna pedagogia literaturo, ke mi agis bone, ĉar la infano „dulingva“ plejfruaĝe devas aŭskulti la lingvojn.

La alia plenumenda tasko estis, ke mi strebis ĉiam antaŭ la infano paroli nur Esperante, neniam bulgare. Ĉar ĉiuj ĉirkaŭ ŝi parolis bulgare, mi devis uzi pli da fortoj kaj obstino, por ke la filineto respondu al miaj demandoj Esperante. Multfoje la infano provokis min paroli bulgare aŭ respondis al miaj demandoj bulgare, sed mi ĉiam postulis E-respondon aŭ min ŝajnis nekompreninta. Tiel la infano kutimiĝis iom post iom praktiki la „lingvon de paĉjo“ kaj respondi aŭ demandi min nur Esperante, eĉ kiam mi kun aliaj parolis bulgare antaŭ la infano. Eĉ mi rememoras pri interesa okazintaĵo. Foje mi revenis de post laboro laca kaj al iu ŝia demando (ŝi estis dujara, se mi bone memoras) mi districte respondis bulgare. La reago estis neatendita. Ŝi ekri-

garidis min kaj ekploris. Ekde tiu momento mi tre atente kaj obstine zorgis pri mia E-kunparolado.


Komence min impresis la fakto, ke la infano pli parolas bulgare ol Esperante, kvankam mia ĉiama esperantista obstino. Kompreneble, mi konsideris, ke ĉiuj ceteruloj parolas al ŝi bulgare. Pro tio ŝi ne tuj ekparolis la du lingvojn samnivele. Same komence min maltrankviligis la fakto, ke ŝi ne parolas Esperanton sufiĉe bone, almenaŭ tiel, kiel mi volus ke ŝi parolu. Estis periodoj de intermikso de ambaŭ lingvoj.

Iom post iom tamen ŝi komencis diferencigi tre bone la du lingvojn kaj senerare parolis kun panjo en „panja“ lingvo kaj kun pacjo en „paĉja“ lingvo.

Mi devas konfesi ankaŭ tion, ke fojfoje la infano direktis al mi demandojn tre malfacilajn, al kiuj mi ne havis pretajn respondojn aŭ temis pri hejmaj aŭ aliaj objektoj, kies esperantaj nomoj mi mem ne konis. Mi elpensadis ion aŭ mi tujkuris al la vortaro por konsulti pri nesciata vorto. Tiel kune kun la infano mi ankaŭ lernis novajn vortojn kaj mi konstante pliriĉigis mian E-lingvaĵon.

Kiam Marina estis tri-jara, naskiĝis Aneta, kun kiu mi ankaŭ Esperante ekparolis, des pli, ke mi jam havis pli da spertoj. Tio daŭris ĝis la sep-jaraĝo de Marina, kiam ŝi devis komenci vizitadi la lernejon. Tiam, opiniante, ke ŝi sufiĉe bone regas parolantan Esperanton, mi decidis, ke estos por ŝi granda ŝarĝo: se ŝi post la lecionoj hejme disdubiĝos inter la bulgara kaj Esperanto. Do mi komencis paroli intermiksita.

Tio vere ne kaŭzis ian kolizion de Marina, sed mi tute ne antaŭvidis la reason de Aneta. Estante jam tri-jara kaj duono, ŝi aŭdis sian paĉjon paroli ankaŭ la bulgaran, kaj pro la fakto, ke ĉiuj ĉirkaŭ ŝi parolas nur bulgare, ŝi obstine parolis al mi bulgare. Ne helpis tio, ke mi ŝajnis min nekomprenanto ŝiajn demandojn aŭ respondojn,



mi estis simple devigita paroli ankaŭ kun ŝi bulgare. Eble tio ŝuldiĝas ankaŭ pro nesufiĉa miaflanka insistado, sed la fakto estas, ke nun estas konsiderinda diferenco en la E-lingvokonoj de Marina kaj Aneta. Poste mi multfoje bedaŭris, ke mi permesis al mi tion, sed jam estis tro malfrue. Pro tio mi konsilis ĉiujn, kiuj volus eduki denaskajn esperantistojn ne cedi kaj neniam ŝanĝi la lingvojn, kiajn ajn estu la kaŭzoj, ĉar la infanoj neniam pardonos tion.

Mi volus diri, ke kun la Esperanta gramatiko Marina konatigis post multaj jaroj, estante en kvina-sesa klaso de la lernejo, malgraŭ ke mi ĉiujare gvidas E-kursojn kaj ofte venigis ŝin al kursoj.

Antaŭ du jaroj ŝi finis trian gradon en IEK-Pisanica kaj ĉi-somere ŝi sola ekdeziris sekvi instru-rajtan kurson malgraŭ, ke ŝi ankoraŭ ne akiris sian mezlernejan klerecon. Mi ne kontraŭis, sed mi konsilis ŝin nur viziti la lekciojn kaj sekvontjare, post la diplomiĝo fari ekzamenojn por instruaĵo.

Koncize tiuj estas miaj spertoj en la denaska instruado de miaj filinoj. Mi volus aldoni, ke kun mia edzino ni vizitis multajn naciajn kaj eksterlandajn E-aranĝojn kaj ofte kunvojaĝigis niajn filinojn. Tie ili havis okazajn praktiki la lingvon kaj konstati, ke ĝi estas la nura rimedo interkompreniĝi kun homoj el multaj landoj. Malgraŭ ke Marina bone parolas la rusan kaj francan, ŝi konstante konvinkiĝas, ke per Esperanto ŝi povas kontakti pli multajn homojn. En 1979 Marina veturis kun ni al 10 okcidenteŭropaj landoj, samtempe al la UEA-Kongreso en Svislando kaj TEJO-Kongreso en Nederlando. En 1982 ŝi vizitis kun sia patrino la Pup-Festivalon en Zagrebo kaj en 1984 ni kvarope gastis al niaj E-amikoj en Leningrado. Ĉie ni uzis plejparte Esperanton kaj en tio konvinkiĝis plej multe Aneta, kiu komence ne emis tre paroli en Esperanto. Reveninte ŝi mem ekdeziris lerni Esperanton kaj sinsekve finis unua- kaj duagradan kursojn en IEK-Pisanica.

Nun Marina ankaŭ aktiviĝis en la E-movado kaj respondecas pri la junulara E-agado en nia urbo Ĥaskovo. Ŝia deziro estas diplomiĝi kiel E-instruistino. Malgraŭ ŝia okupiteco en la lernejo ŝi ofte helpas min en mia laboro kiel Prezidanto de la Esperanto-Societo en Ĥas-

kovo kaj en korektado de la
hejmtaskoj de miaj kursanoj.

*Fine mi volus skribi, ke
jam ekde unu jaro mia fami-
lio estas enlistigita en la an-*

*taŭ nelonge kompilita no-
maro de esperantlingvaj pa-
roj kaj familioj laŭ iniciato de
Anna Brennan kaj Renato*

Corsetti (Italio).

Nikola UZUNOV
Haskovo, j. k. Trimata
remisiti
bl. 18/B, ap. 10, Bulgario

Atenton por niaj denaskuloj

**La jena eseeto enkondukis la unuan
numeron de „Cirkulaĵo por esperant-
lingvaj paroj kaj familioj“, pasintan
septembron. Ni trovas la temon inte-
resa kaj inda je plua diskuto, se trovi-
ĝas emuloj inter nia legantaro!**

Kiam Esperanto-parolanta itala/brita pa-
ro ekloĝas kune, ili malkovras, ke eĉ tiel
simpla koncepto kiel „kafo“ povas havi du
tre malsamajn signifojn, por ne menci-
i aliajn vortojn kiel „taso“ aŭ „matenmanĝo“.
Tiaj problemoj kutime ne falas en la aten-
tosferon de esperantologoj, kiuj pli intere-
siĝas pri gravaj demandoj kiel la origino de
la vorto „edzo“ en Esperanto. Sed eble tio
estas bonŝanca, ĉar certe tiuj, kiuj pleje ka-
pablas okupiĝi pri tiaj demandoj, estas la
homoj kiuj parolas la lingvon ĉiutage.

Kiam la menciita itala/brita paro naskas
du infanojn, aperas novaj problemoj en la
terminologia kampo. Vindotukoj, suĉiloj,
plastaj littukoj, rulseĝetoj, kradludejoj ktp.
malofte trovas lokon en Esperantaj vortaroj.
Sed tio ne multe surprizas, se oni ekpensas
pri la speco de homo, kiu verkas vortaron.

Cetere, la edukado de du denaskaj espe-
rantistoj kreas ankaŭ aliajn problemojn
(krom tiu pri manko de tempo). Unue oni
devas decidi pri la lingvoj parolotoj en la
familio: kiu parolu kiun lingvon al la inf-
anoj. Due oni devas solvi ĉiujn dubojn, kiuj
kutime ĉirkaŭas infanan dulingvecon („Ne
tro ŝarĝu la etan kapon!“, „Ne konfuzu lin-
/ŝin“). Kaj poste oni konstatas, ke denaskaj
esperantistoj bezonas ne nur infanajn
librojn en Esperanto, sed ankaŭ ludojn,
kantetojn, rakontojn kaj simile.

Jus ĉeestinte renkontiĝon por
Esperanto-parolantaj familioj en Hungario,
ni konstatis, ke ne nur ni sentas tiujn bezo-
nojn. Ekzemple, ĉiuj gepatroj de denaskaj

esperantistoj plendas pri la manko de taŭ-
gaj kantetoj kaj poemetoj por infanoj. Tiuj,
kiuj ekzistas, ĝenerale ne estas facile retro-
veblaj.

Tial ni decidis lanĉi cirkuleron por diskuti
tiajn demandojn, kaj ebligi al paroj kaj fa-
milioj uzantaj Esperanton en la ĉiutaga vivo
kontaktiĝi inter si. En ĝi eblas diskuti termi-
nologiajn problemojn de la hejma vortpro-
vizo, prezenti kantojn poemojn kaj mallon-
gajn rakontojn por infanoj, recenzi infanajn
librojn, diskuti pri denaska dulingveco,
anonci kunvenojn por familioj, meti
anoncetojn por bezonataj materialoj kaj
kontaktoj ktp.

Bonvolu se eble sendi kontribuojn en
jam fotokopiebla formo, t. e. sur aparta fo-
lio de formato A4, nete tajpitajn sen interli-
niaj spacoj. Vi respondecas pri viaj propraj
akuzativoj. Krom se ili estas eksterordinare
interesaj, ni ne akceptos artikolojn pli lon-
gajn ol unu paĝon; ĝenerale, kontribuoj
prefere estu mallongaj kaj koncizaj.

Alia tre bonvena maniero kontribui, estas
per la sendo al ni de adresoj de aliaj paroj
kaj familioj, kiuj laŭ via scio uzas Esperan-
ton inter si. Tiel nia adreso-arĥivo laŭgrade
povos ampleksi grandan kvanton de la ho-
moj en nia situacio. Tre bonvenaj estus
adresoj de homoj loĝantaj ekster Eŭropo.

Anna BRENNAN/Renato CORSETTI
Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio

(El „Esperanto“ n-ro 3/88)

DORA GABE

DENTOBREĈULINO

*En buŝeto mia
mankas flanka dento
dum mi dormis tie
falis ĝi momente.*

*Ni ĝin serĉas vane
jam eĉ sub la lito,
ĝin forportis tamen
la nigra korniko.*

*Dentobreĉulino
mi nun jam ekestas.
Diris la patrino:
„Ho, vi dolĉa restas!”*

BONAN NOKTON

*Dormu, dormu, okuletoj,
ne petolu vi, manetoj,
la grileto en angulo
por vi kantas: lu-lu, lu-lu;
panjo milde vin karesas,
sed steleto ne forgesas
super vi kliniĝi ankaŭ
ekrigardi kaj demandi:
— Kiu estas en la lito?
— Franjo, fracjo, sen hezito,
kun kvar gambetoj,
kun kvar manetoj,
kun kvar okuletoj!
— Bonan nokton, infanetoj!*

Tradukis: Venelin MITEV

KONKURSO POR TRADUKEMULOJ

La Esperanta Kulturdomo en Pleven anoncas konkurson dediĉe al 70-jara datreveno ekde la naskiĝo de poeto, esperantisto kaj revoluciulo Cvetan Spasov el la sama urbo, pereinta heroo en la kontraŭfaŝisma batalo.

La konkurso antaŭvidas tradukon NUR de jenaj versaĵoj:

Обичам, Вяра (1), Заръка, Станси (1), За-
връщане, Първи сняг, АЗ съм стохиял-
ният град, Левски, Вяра (2), Утро, Станси
(2), Вяра (3), Виждаш ли през калното стък-
ло, Есенни стихове, Прег радиото, Възле-
копачи, Рогина, Добруджанска майка, Кафе,
Песен, Възторг, Посвещение (на Ленко), На
майка ми, До любимата, Легенда, Приказка
чудна.

Jurio prijuĝos la konkursaĵojn. Tri el la plej
bonaj tradukoj estos premiitaj.

Ĉiuj tradukoj aperos en aparta kajero, kiun la
Esperanta Kulturdomo dissendos al la E-socie-
toj kaj kluboj en la lando kaj al E-societoj kaj
unuopuloj eksterlande. Ilin povos uzi ŝatantoj
deklami, kiuj partoprenos en la konkurso-reci-
talo de poezio de Cvetan Spasov okazante en
la aŭtuno de 1989 en Pleven.

Bonvolu sendi la konkursaĵojn tajpite en 4 ek-
zempleroj ĝis la 31-a de marto 1989. La tradu-
koj estu subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta
koverteto aldonu la veran nomon kaj adre-
son de la tradukinto kaj ĉion sendu al adreso:
5800 Pleven, str. „Canko Cerkovski” 14, Espe-
ranta Kulturdomo (por la konkurso).

En ĉielo blua... tondras gaje nia kant'...



La unua koncerto.

Tiel eksonis la unua kanto de la Miksa Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj en julio 1978 sur la scenejo de la granda salono en la Domo de Sovetaj Scienco kaj Kulturo — Sofio. La ĥoro estis fondita de grupo da entuziasmaj esperantistoj, el kiu elstaris: Zora Oŝanska, Ivan Keremidĉiev, Minko Conkovski, Dimităr Terziev, Elena Cvetkova k. a. Post du semajnoj enkadre de la 63-a UK de Esperanto en Varna la ĥoro estis admirinda surprizo per sia plenumo de kelkaj kantoj, aprobe akceptitaj per longaj aplaŭdoj de la kongresanoj.

Tio estis la komenco de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, gvidata de entuziasma ĥorestro kaj komponisto Dimităr Terziev kun akompanistino Katja Hristova.

La kankolektivo iom post iom pligrandigis de homoj, inspirantaj de la humanaj ideoj pri paco kaj internacia amikeco, por propagando kaj disvastigo de Esperanto. Ĝi aktive partoprenis la kulturen vivon de la ĉefurba esperantistaro.

La unuaj solistinoj estis Gizella Dande kaj Karamfilka Adamova. Poste la ĥoro ekhavis ankoraŭ multe da bonegaj solistoj kiel Veselin Damjanov, Stefan Paskulov, Dimităr Denĉev, Rosica Janĉeva, Vilhelmina Kapitanska, Stanka Petkova, Emilia Anodonova k. a.

Longan tempon sur la scenejo aktivis en E-kunvenoj kaj solenaĵoj la sektejo de la ĥoro, konsistanta el Vilhelmina Kapitanska, Stanka Petkova, Liljana Dokova, Dimitrina Genova, Jordanka Arnaudova kaj Veneta Arnaudova. Ĉi-jare la Ĥoro celebras sian jubilean dek-jariĝon. Dum sia ekzisto la ĥoro koncertis kaj gajnis premiojn multloke en-kaj eksterlande.

En 1982 enkadre de 67-a UK en Antverpeno

malgranda parto de nia ĥoro sub la direktado de Dimităr Terziev koncertis kaj gajnis ŝtormajn aplaŭdojn, plenumante bulgarajn kantojn en Esperanto. La bulgara kanthoro estigis kerno de la Internacia E-Ĥoro, iniciatita de nia senlaca ĥorestro Dimităr Terziev. En 1983 en UK de Esperanto en Budapeŝto la ĥoro en plena konsisto faris sukcese du koncertojn kaj ferme de la kongreso kantis kun la Internacia E-Ĥoro.

La sekvontjaron la ĥoro, invitita al Pollando, partoprenis Konferencon de „Monda Turismo” dum la Tagoj de Bydgoszcz. La kvar koncertoj pro sia alta nivelo alportis al la ĥoranoj grandan ĝojon kaj novajn premiojn.

Nialande la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj koncertis en Plovdiv, Vraca, Smoljan, Kjustendil, Bankja, Pleven. Dek jarojn ĝiaj kantoj sonis en E-kunvenoj, solenaĵoj, kongresoj, eĉ en kvartalaĵ kluboj kaj gajnis popularecon kaj amikecon. La ĥoranoj strebis plialtigi la nivelon de sia kantomajstreco, ne ŝparis tempon kaj fortojn.

Nun entuziasme ĥorestras la juna, talenta muzikistino Katja Delĉeva-Vučkova. Sub ŝia gvidado la ĥoro partoprenis la ĉefurban revuon de la amatora arto. Pro patrinedo K. Vučkova estas provizore anstataŭita de elstara ĥorestrino Dora Hristova, sub kies gvidado la ĥoro gajnis oran medalon en la respublika festivalo.

Multjare fruktodone laboras en la ĥoro la pianistino Lili Panajotova kaj muzika pedagogo Emilija Andonova kiu estas belega solistino.

Multaj membroj de la ĥoro estis ornamitaj per la jubilea ora medalo de BEA „100 jaroj de Esperanto”.

Stefka AKMANOVA



Enlanda movado

NEPRE INTERŜANĜU SPERTON!

● Al ĉiuj E-societoj

Malnova devo de la ŝumenaj esperantistoj estis ankaŭ en ilia urbo malfermi librovendejojn, kie vendeblos E-literaturo kaj eblos de proksime konatiĝi kun ĝi, oni povos aĉeti esperantaĵojn por siaj propraj bezonoj kaj por la multnombraj eksterlandaj geamikoj. En la pasinteco oni kelkfoje provis sensukcese. Almenaŭ post la Januaro. Plej kunsido de CE de BEA kaj la unuigo de la kelkaj urboj E-societoj en unu pli potenca kaj aŭtoritata, la revo efektiviĝis.

La nova societa prezidanto Ĥristo Tonev, mem konvinkita en la neceso kaj signifo de tiu afero, plezure kaj persiste klopodis ĝian realigon. Post kelkaj vizitoj al la regiona entrepreno „Peĉatni proizvedenija“ (Presadoj) kaj renkontiĝoj kun ties direktoro, estis trovita la vojo. Estis preparolataj ĉiuj jaraj kaj financaj detaloj por la funkciligo de faka stando en unu de la urbaraj librovendejoj kaj subskribita kontrakto inter E-societo „Vekiĝo“ kaj la menciita presajdisvastiga entrepreno.

Ekde unuaj majtagoj ŝumenaj esperantistoj jam ekĝuis la novan akiraĵon. En la konata al ĉiuj urbanoj librovendejo „Nahodka“ ĉe bulv. „Slavjanski“ nun paralele kun multaj bulgaraj kaj sovetiaj libroj aĉeteblas ankaŭ esperantaĵoj. Malantaŭ la vasta vitrino estas aparta loko, kie oni montras E-librotitolojn kun diversaj eldonjaroj. Apude estas eksponitaj E-lernolibroj, vortaroj, gramofondiskoj, liverataj al ĉiuj aĉetemuloj sendepende de ties esperanteco. La librejstrino Maria Ljubenova, kvankam neesperantistino, respondece okupiĝis disvendadi tiun kroman varon. Ŝi ĉiam ĝentilas, rideme klarigas al scivolemuloj ĉion, rilatantan al Esperanto kaj jam enlistigas ĉiujn aliĝontojn al la novaj E-kursoj. Tial do la ĝisnunaj rezultoj estas surprize kontentigaj. Ankaŭ klientoj el aliaj enlandaj loĝlokoj plezure „enlibrejiĝas“. Aĉetantoj fariĝas ankaŭ geesperantistoj el GDR, Pollando, Francio k. a., gastantoj en Ŝumen. Dum certaj tagoj estis liveritaj libroj kaj gramofondiskoj por dekoj da levoj. Kaj tiuj ĝojigaj rezultoj kromgajnigas la vendistinojn kaj entreprenojn. Sed ne ignorendas la plejĉefaĵo — ankoraŭ pli efike ekdisvastiĝas nia kara Esperanto!

CE de BEA plene aprobis la bonan iniciaton de ŝumenanoj. Kvankam iom malfrue, junie estis sendita certa kvanto da disvendenda literaturo. La E-libroj kaj — gramofondiskoj, disponigitaj al la societo, rapide elĉerpiĝis, kaj nuntempe la vendejbretaro preskaŭ malplenas. Akre necesas, ke CE disponigu novan kvanton da E-libroj! La bona iniciato bezonas nepran urĝan helpon! CE devas senprokraste pli aktive helpadi, konkrete decidi kiamaniere certigi konstanta stoko de E-literaturo por Ŝumen, ĉar esperantistoj kaj ceteraj civitanoj de tiu malproksima de Sofio regiono ŝatas kaj deziras legi Esperante!

Cvjatko TODOROV

PER ATENTOKAPTA MANIERO

Jam de sia fondiĝo la esperantista klubo „Metalurgo“, funkcianta ĉe la sindikata kulturdomo en la Entrepreno por Prilaboro de Aluminio „Stamen Stamenov“ en urbo Ŝumen, organizas solenajn lige kun la fino de la lernojaroj de Esperanto. La ĉi-jara solenaĵo, okazinta la 7-an de julio, havis la temon „Esperanto en mia vivo“. Kiel preludo al la solenaĵo Todorka Georgieva deklamis la versaĵojn de Ĥristo Botev „Al la frato“, pro kies plenumo en la nacia konkurso de Botev kaj revolucia poezio ŝi gajnis kuraĝigan premion. Tio donis esperantistan etoson al la solenaĵo, kiun partoprenis malnovaj kaj novaj membroj de la klubo kaj gastoj el aliaj kluboj en la urbo. Ilija Andrejev, gvidanto de la klubo, faris koncizan resumon pri la lernojaroj. Li emfazis, ke la diplomo, kiun ĉiu meritinto nun ricevos, havos valoron, se ĝia posedanto plue klopodos perfektigi en uzado de la internacia lingvo Esperanto. Alikaze, post ne longa tempo, ĝi estiĝos papero tute senvalora. Lernado de la lingvo similas al konkurso, kiu havas komencon kaj neniam oni povas atingi ĝian finalon. Sperto akireblas rezulte de multaj ekzercoj kaj imitado de bonaj ekzemploj. De nun Esperanto devas eniri ilian vivon por neniam forlasi ĝin. Memoru ili bone, ke lingvon oni lernas ne por pasigi la tempon, sed por uzi ĝin por siaj kaj sociaj bezonoj.

Kara gasto de la solenaĵo estis inĝ. Stefan Georgiev, kiu nun laboras en la uzinaro por produktado de kamionoj. Li per atentokapta maniero skizis la tutan vojon tra kiu Esperanto iom post iom penetris lian vivon kaj fariĝis lia kunulo por ĉiam. Abundaj kaj interesaj estis la ekzemploj, kiujn li konigis al la ĉeestantoj de la unua informo pri Esperanto kiel „lingvo por ĉiuj popoloj“ ĝis la akiro de diplomo instrui la lingvon kaj kapablon uzi ĝin skribe kaj parole kaj partopreni renkontiĝojn kiel aktivulo, sed ne kiel muta observanto.

Ilija ĤRISTOV

BARELIEFO DE ZAMENHOF

Bareliefio de d-ro L. L. Zamenhof troviĝas ankaŭ en la arbara parko de v. Enina, en la regiono de Kazanlâk. La bareliefon ellaboris en 1975 la pentristo Nikola Kisjov, esperantisto el Kazanlâk.

Dimo MARTINOV

La Redakcio de „BE“ pardonpetas pro la presezaro en n-ro 9/1988. Sur paĝo 4 en la lasta frazo de la artikolo „Edmond Privat“ anstataŭ 1962 estas skribita 1922.

En la sama numero sur paĝo 12 mankas la fonto de la artikolo pri la E-centro en Bjalistoko. Tio estas revuo „Esperanto“ n-ro 5/1988.

„BE“

ADRESARO

Karaj legantoj,

Por faciligi la kontaktojn inter la bulgaraj esperantistoj, de tiu numero ni komencas publikigi la adresojn de E-societoj en nia lando. Vi ankaŭ havos eblecon ekscii la nomojn de la societaj prezidantoj.

„BE”

SOFIO — URBO

1000 Sofio, pl. „Slavejkov” 1
P. K. 265

prez. Tanja Mileva;
E-societo „Balkana Stelo” —
blindaj esperantistoj

1330 Sofio, str. „Rumjana” bl. 22
vh. G ap. 85; prez. Jordan Jordanov;
E-societo „Stefan Minkov” —
komunumo „Krasna Poljana”

1303 Sofio, bul. „Hr. Botev” 119
prez. Ivan Ivanov; E-societo
„Renaskiĝo” — komunumo „Vâzrajdane”

1113 Sofio, str. „Latinka” 6;
prez. Radosvet Kazakov;
E-societo en komunumo „Ĉervena
Zvezda”

1202 Sofio, str. „Rakovski” 23;
prez. Lasto Nikov; E-societo
„Penka Miĥajlova” — komunumo
„Serdika”

1309 Sofio, str. „Simeon” bl. 303,
vh. G; prez. Maria Slavĉeva;
E-societo „Nikola Ŝopov” —
komunumo „Ilinden”

1220 Sofio, JK „Nadejda”
bl. 236, vh. A, ap. 20;
prez. Jeĉka Pavlova;
E-societo „Espero” —
komunumo „Nadejda”

1505 Sofio, str. „Ribarica” 22
bl. 4, vh. A; prez. Stojana Markova;
E-societo en komunumo „Slatina”

1504 Sofia, str. „San Stefano” 23/A;
prez. Maja Gorova; E-societo en
komunumo „Sredec”

1320 urbo Bankja, str. „Al. Stambo-
lijski” 5; prez. Boris Atanasov;
E-societo „Solidareco”

1463 Sofio, str. „Ŝandor Petjofi”
47—49; prez. Veneta Baleva;
E-societo „Kosta Penev” —
komunumo „Triadica”

Sofio, bul. „Gvjatko Radojnov”
bl. 2, vh. B, ap. 34;
prez. Ginka Dilova;
E-societo „Nikola Botuŝev” —
komunumo „Oboriŝte”

1680 Sofio, JK „Krasno Selo”
bl. 19a, vh. B, ap. 39;
prez. Petrana Lalova;
E-societo „D-ro Stanjo Vasilev” —
komunumo „Krasno Selo”

1115 Sofio, JK „Mladost”
bl. 428, vh. V; prez. Stefan Radev;
E-societo „Miloslav Bogdanov” —
kimunumo „Mladost”

1336 Sofio, JK „Ljulin”
bl. 410, vh. G;
prez. Nikolina Ĵabinska;
E-societo „Anĵelo” —
komunumo „Ljulin”

1592 Sofio, JK „Drujba”
bl. 104, ap. 24;
prez. Rangel Ivanov;
E-societo „ADA” —
komunumo „Iskâr”


(Daŭrigota en n-ro 12/1988)

Georgi Dolapčiev ne plu inter ni...

Denove funebra novaĵo trafis la bulgaran esperantistaron: forpasis la konata esperantista aktivo Georgi Dolapčiev, unu el la veterana gvardio de bulgara Esperanto-movado kaj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF).

Li posedis grandan sperton. Ne hazarde dum tre respondeca periodo de la postmilita formiĝo kaj evoluo de Esperanto-movado en Bulgario, oni elektis lin prezidanton de BEA. Desur tiu plej elstara asocia pozicio li manifestis vigan kaj utilan aktivecon.

Georgi Dolapčiev estis la ĉefa organizanto de X jubilea kongreso de IFEFF en Varna (1968). Li sukcesis venigi al la kongreso la honoran prezidanton — ministron de la transporto. La ministro restis tre kontenta de la



kongresaferoj, kaj la kongresanoj — ege kontentaj pro lia persona ĉeesto kaj alta pritakso de ties aktiveco, favora rilato al la taskoj de IFEFF. Kiel prezidanto de Bulgara Sekcio de IFEFF Dolapčiev brile gvidis la tutan organizan laboron por la jubilea kongreso. Plurfoje oni elektis lin estrarano de IFEFF.

Malgraŭ sia estiminda aĝo (naskita en 1906, forpasinta en 1988) li ĝis la lasta momento de sia vivo ne ĉesis labori por la

prospero de nia komuna Esperanto-afero. Ĝis antaŭnelonge li plenumis la funkciojn de Prezidanto de Kontrola Revizia Komisiono ĉe Centra Estraro de BEA. Kelkaj kongresoj de BEA reelektis lin je tiu posteno, kiu donis al li eblecon partopreni ankaŭ la kunsidojn de la Buroo de la Centra Estraro kaj kontribui por la saĝa solvado de multaj gravaj problemoj de nia landa kaj de la internaica Esperanto-movado.

Li bonege konis la Internician Lingvon kaj faris altkvalitajn tradukojn el la bulgara en Esperanton.

Per sia profesia edukiteco li faris utilan laboron ankaŭ en la gvidrondoj de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK).

Lian laboremon povis admiri ĉiu esperantisto.

Nikola ALEKSIEV

Forlasis nin la sindona BEA-anino, arde amanta Esperanton, en sia 73-a jaraĝo Radka Georgieva Rujanova, naskiĝinta en Sofio en labриста fervojista familio.

Post la gimnazia kleriĝo ŝi finis artabrod-kaj kudrokursojn samkiel kursojn por telegrafistoj en Bulgaraj Ŝtatfervojoj. Sinsekve ŝi oficis en stacidomo Sofio, ŝiptransporto kaj BEA.

En Esperanton ŝi eniris 1965 — en fervojistan E-societon „Prospero“, poste fariĝis „Maksim Gorkij“-societano.

Ŝi bonege artbrodis la BEA-flagon kun portreto de D-ro Zamenhof. En 1978 ŝi estis informantino dum UK en Varna.

Radka Rujanova estis senkompromisa batale-

mulino kontraŭ maljusto, negativajoj, falseco. Tia ŝi restis ĝis la lasta spiro.

BEA

La 26-an de junio 1988 forpasis la sincera amiko de bulgaraj esperantistoj kaj nia lando d-ro GYÖRGY BERESZTÓCZY, sekretario de nia ĝemeligiinta E-grupo „Ujlaki“ en Budapeŝto.

Li estis 79-jara, gimnazia eksinstruisto, bonega pedagogo, senlace klopodinta transdoni al la grupanoj siajn grandajn konojn pri literaturo, muziko kaj aliaj artoj kune kun la ŝatata lingvo Esperanto.

Ni kondolencas al niaj geamikoj el E-grupo „Ujlaki“ pro la trafinta ilin granda perdo.

Sofiaj Esperanto-societoj „Penka Miĥajlova“ kaj „Espero“



Deziras korespondi

BULGARIO

RUMJANA RUSEVA (28-jara, studentino) — Sofio, JK Băkston, ul. Petăr Tonev 39 A, vñ. B, ap. 44, et. 8 — kun ĉi pri muziko, angla lingvo, pentroarto, naturo, vegetarismo kaj jogo.

DIMITRINKA IVANOVA (27-jara) — 7101 Bjala, Razgradska obl. ul. Gavril Genov 20 — kun ĉi pri ĉt.

TONČO TONEV — 6430 Meriĉleri, Haskovska obl. ul. Bojka, bl. 3, ap. 18 — kun ĉi pri ĉt.

TEODORA KRÁSTĖVA (49-jara, instruistino) — 5000 Veliko Tărnovo, ul. Z. Karavelov 43 A, p. K. 3 — kun ĉi pri ĉt.

BOJANA DJANKOVA (12-jara, lernantino) — 5000 Veliko Tărnovo, ul. Samuil 1 — kun samaĝuloj tutmonde pri ĉt.

ĈEĤOSLOVAKIO

LADISLAV DVORAN (57-jara) — 39102 Sezimovo Usti II, str. K. Hajence 675/A — kun Bulgario, Hungario, GDR, FRG, Svislando, Finnlando, Britio, Nederlando kaj Italio — pri teatro, sporto, danca popolmuziko, kuirarto, vegetarismo, vojaĝoj. Kolektas BK, PM, kalendarojn, esperantajn insignojn kaj gramofondiskojn.

OLGA CHALUPOVA — 73691 Havirov 1, str. Gotwaldova 73 — kun ĉi pri ĉt.

HUNGARIO

PETER NADY (15-jara) — 3000 Hatvan, Kéke ut. 16 — kun ĉi pri historio, naturo, muziko kaj sporto. Kolektas PM kaj insignojn.

ISTVAN SOMOSKÓI (20-jara, bankoficisto) — 3182 Karancslapujtő, str. Dozsa 7 — kun ĉi pri turismo, sporto, lingvo kaj pop-muziko.

GDR

VERENA GODEY (29-jara) — 7010 Leipzig, str. d. 18 Oktober 6 A/64 — kun ĉi pri muziko kaj vojaĝoj. Kolektas BK.

NEDERLANDO

FRANS VAN WEGEN (pensulo) — 56 WH Eindhoven, Leuvenlaan 62 — kun ĉi pri E-ĝado. Kolektas PM.

IRANO

SADECH MALEKI (27-jara, artisto, kaligrafisto kaj meblopentristo) — 16419 Tehran, kh. Tehran-now, kh Sharech Shahio Mahtabi 17 — kun ĉi pri kulturo, literaturo, arto, Esperanto kaj paco.

POLLANDO

LENO ROMANEK (43-jara, sola kun du filoj) — 22—110 Ruda Huta, ul. Jlova 18 — kun bulgaraj esperantistoj pri paco, turismo, fotografio, kolektado.

TAMARA-DOROTA FIC (24-jara, studentino) — 15—814 Bjalystok, ul. Berlinka 42 m. 116 — kun ĉi pri muziko kaj ĉevaloj.

ANIA WĘGRZYN (15-jara) — 42—200 Czystohowa, ul. Powst. Slaskich 8 m 59 — kun ĉi pri muziko, sporto kaj literaturo. Kolektas PM kaj etiketojn.

MARIUS GORNIC — 02—129 Warszawa, str. Jan-kovska 3/99 — kun ĉi pri ĉt.

SOVETUNIO

NAUMO KOVNATORS (E-instruisto) — 229700 Liepaja, Fr. Brivzemnieka 24—2, Latvja SSR — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK kaj turismajn prospektojn.

KOMENCANTAJ GEESPERANTISTOJ (16—60 jaraĵ) — 234640 Varena a. k. 53, E-klubo "Puneto" — kun ĉi pri ĉt.

EDITA BAGDONAITĖ (17-jara) — 234930 Anykšciai, Kvarco 40 — kun ĉi pri muziko, literaturo, kino kaj arto.

RASA RADZAVICIUTE (17-jara) — 234930 Anykšciai, Kolukieciu 30 — kun ĉi pri ĉt.

USONO

JOHANO TOWSEN — 90020 CA Los Angeles, 329 SO Manhattan Plac. 709 — kun ĉi pri ĉt.

TRA LA GAZETARO

En Sofio:

En revuo „Bălgaro-Săvetska Druĵba“ (n-ro 5/1988) aperis skizo pri Esperanto-aganto Hristo Gorov. La skizon verkis Diana Dimih. Ankaŭ pri la sama veterana esperantisto revuo „Filmovi novini“ (n-ro 7/1988) publikigis artikolon, skribitan de Rumen Grigorov.

La revuo „Bălgarski Jurnalist“ aperigis recenzon de Ivan Vandov pri la bulgarlingva libro „Sto godini Esperanto“ (Cent jarojn Esperanto), verkita de Nikola Aleksiev. La populara ilustrita revuo „Paraleli“ (n-ro 26/1988) proponis al siaj legantoj naŭ ĉapitrojn el la libro de d-ro Artur Baur — „La fenomeno Svislando“, originale verkita en Esperanto. Tradukis ilin Nikola


Stranganski — direktoro de Somera Teatro en Slănĉev Brjag.

En la lando:

Dum la someraj monatoj la ĵurnalo „Ŝumenska Zarja“ publikigis kelkajn verkojn pri Esperanto. Je la 9-a de julio aperis anonco pri la pentrajekspozicio de infano-esperantistoj, dediĉata al la Kvara Internacia Asembleo „Standardo de la Paco“ — Sofio'88. Pri la sama ekspozicio la ĵurnalo publikigis ankaŭ informon (12.07.1988). Denove en „Ŝumenska Zarja“ (09.08.1988) Hristo Tonev verkis artikolon titolitan „Esperanto kaj turismo“. Uzina gazeto „Duma na metalurga“ — Uzino por Aluminio en Ŝumen, publikigis du verkojn pri Esperanto (25.05.1988 kaj 13.06.1988) de Ilija Andreev.

ABONU KAJ ABONIGU REVUON

Bulgara Esperantisto



Ĉu vi jam abonis revuon „Bulgara Esperantisto” por 1989? Se vi feris aŭ ne sukcesis fari tion pro aliaj kaŭzoj, vi ankoraŭ havas tempon. Sed ne prokrastu! Iru al via poŝto kaj certigu al vi tutjaran regulan ricevadon de via revuo! Ne preterlasu aboni la organon de Bulgara Esperantista Asocio ankaŭ por viaj eksterlandaj amikoj.

● Per la revuaj paĝoj vi festos kune kun ni la 70-jariĝon de „Bulgara Esperantisto” — unu el la plej malnovaj E-periodaĵoj en la mondo!

● En nia revuo vi trovos interesajn por ĉiu aĝo legaĵojn.

● Legante la revuon, vi ekscios multe da E-novajoj, informiĝos pri diversaj aspektoj de la movado kaj ĝuos agrablajn minutojn kun nia Distra paĝo.

● Vi trovos vian preferatan rubrikon: Lingvaj demandoj, Esperanto en profesioj, Originala verkaro, Leteroj de korespondamikoj, Juna Esperantisto, Verdaj steletoj, Deziras korespondi...

● Vi ĝuos pli belaspektan kaj luksan eldonon! Abonprezo por Bulgario estas 4.80 lv, por socialismaj landoj — 7.32 lv kaj por aliaj landoj — 7.80 lv.

„Bulgara Esperantisto” estas abonebla per la poŝto ankaŭ en ĉiuj socialismaj landoj. Alilandanoj, kiuj deziras aboni nian revuon, bonvolu sendi la abonkotizon (32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto) laŭ la konto de Bulgara Esperantista Asocio ĉe la Centra Oficejo de UEA, en Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ĉi-sube ni proponas al via atento ankaŭ la nomaron de niaj eksterlandaj perantoj:

BRITIO: S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby Grimsby, South Humbertise DN36 5RT

FRG: S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D—6738 Elmstein.

FRANCIO: S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 2521936

HISPANIO: S-ro Adonis Gonzales Meana, Apartado 242 Gijon — Asturias.

JAPANIO: S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1-2418-18 Tokorozawa 359 Japan

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „Bulgara Esperantisto” en landoj, kie la revuo ne havas reprezentantojn — estos afable akceptita.



Kara Redakcio.

Mi estas nova esperantistino. La gazeto „Bulgara Esperantisto” tre plaĉas al mi. Mi ĉiam legas ĝin per granda intereso.

Mi estas oficistino kaj tre ŝatas kuir. Eĉ mi unu jaron instruis kuirarton en urbo Miĉurin. Baldaŭ mi tradukis en Esperanton du kuirreceptojn. Mi estus tre feliĉa se ili plaĉus al la legantoj de „Bulgara Esperantisto”.

Rumjana JORDANOVA
8400 u. Karnobat
st. „Grozdu Grozdev” 19

Bonan
apetiton!

OVOVENTUMILO

Prepartempo — 30 min., 1 porcio — 520 klorioj. Produktoj por 5 porcioj: 200 g. da seka pano; 0,2 l da freŝa lakto; 250 g da bakitaj melongenaj; 200 g da ruĝaj tomatoj; 150 g da fromaĝo; 0,07 l da heliantoleo; 5 ovo; 5 ajleroj; 1 fasko da petroselo; kuirsalo laŭguste.

Preparo: Oni distranĉas la panon je malgrandaj pecoj kaj oni surverŝas ĝin per la freŝa lakto.

Oni kunmetas la bakitajn melongenajn; la duonon de la ruĝaj tomatoj, antaŭe purigitaj el membranoj; la pestitan ajlon, 100 g da fromaĝo, raspita per raspilo. Oni kunmiksas bone per miksililo kaj almetas la malsekigitan panon. Denove oni kirlas, ĝis kiam rezultas homogena miksaĵo. Samtempe oni almetas pli ol la duono de la oleo kaj kuirsalon.

La pretan miksaĵon oni distribuas kiel ventumilojn en 5 telerojn. Sur mallargajn ventumilrandojn oni almetas po unu frititan en la cetera oleo nekirlitan ovajon.

La porciojn oni garnas per la ceteraj ruĝaj tomatoj, per raspita fromaĝo kaj per tranĉita petroselo.


DOLĈAJO

Produktoj: 70 g da bovinbutero, 4 ovo, 1 tetaso da sukero, 1 tetaso da faruno, juglando kaj sukerpulvoro.

Preparo: En bakplado oni fandas la bovinbuteron. Sur ĝin oni metas tranĉitajn juglandojn dense sur la tutan fundon de la bakplado. Oni kirlas la ovojn, la sukero kaj la farunon. La miksaĵon oni elŝutas sur la juglandojn.

Oni bakas en modera bakaĵo. Post tio oni inversigas la bakitan dolĉaĵon kaj superŝutas sukerpulvoro sur la juglandojn.

AMUZA ZODIAKO



SKORPIO

(23 de oktobro — 21 de novembro)

Kontraŭ li eĉ dio mem sin gardu!
(Ĉiam provos „tani” vin kun ardo).
Jen li ektumultos, jen kontestos,
kontraŭ ĉio akre ekprotestos.

Tie ĉi naskiĝas generaloj —
iuj pli timigaj ol ŝakaloj!
Kaj jaluzaj estas, tro danĝeraj,
plenŝtopitaj per planoj inferaj.

Ofte ili rompas fidelecon,
ne donante ian rajtopecon...
Tamen estas eĉ prudentaj, bonaj,
malavaraj dum elspezoj monaj.

En bezono helpas al vi urĝas,
de malriĉaj ili ne forfuĝas.
Naskotage ili vin honoras,
eĉ al proksimumoj plu bonkoras.

Se li viro — por justeco lukto
kaj aspiro nobla ekbonfruktos.
Skorpiinoj estas akraŭvidaj
spitulinoj, tamen ŝanĝ-avidaj...

Se bontaktos kune — sukcesinto
estas vi, aliel — forpasinto!...
Vi, Skorpi’, kun Taŭro ne kverelu,
por ke vian junon li ne pelu!